EGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

5
1976
8.- Ft

CHINOIN GÉPGYÁR



fabrikas maŝinojn taŭgajn por strikta pakado
de individuaj kaj kolektivaj pakaĵoj
Se vi havas tiurilatan interesiĝon bonvolu kontaktiĝi kun

HUNICOOP Gépipari Kooperációs Külkereskedelmi Iroda

Maŝinindustria Koopera Kontoro por Internacia Komerco
Ĝi estas volonte je via dispono:

HUNICOOP

HUNICOOP

H—1062 Budapest, Népköztársaság útja 113.
Telefon: 424-950
Telex: 22-4435

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: H—1081 Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6.
Poŝta adreso: H—1368 Budapest
Pf.: 193.
Aperas dumonate
XV. jaro 1976. 5-a numero

Numero pri Ferenc Rákóczi

ENHAVO

Fenyvesi, E.: Rákóczi 1
Kiel la samtempuloj vidis 3
Petőfi, S.: Rákóczi (Tr. M. *Fejes)* 3
Kiam Rákóczi iris en Pollandon (Tr. B. *Sipos)* 3
Fenyvesi, E.: Eŭropo kaj la liberecbatalo de Rákóczi 4
Krúdy, Gy.: La sonorilego de Rákóczi (Tr. I. *László)* 6
Lévay, J.: Mikes (Tr. M. *Fejes)* 7
Mikes, K.: Leteroj el Turkio (Tr. T. *Ujlaky-Nagy)* 8
Barabás, T.: Multaj estas la kurucoj (Tr. Zs. *Varga-Haszonits)* 11
Panoramo (Tr. Sz. *Bálint)* 12
Benczik, V.: Rendevuo en Greklando 14
Rezultoj de la Belartaj Konkursoj 1976 15
Vasarely-fonduso en Pécs 16
Lázár, E.: La leporo kiel interpretisto 18
Gergely, M.: Pri niaj datrevenoj 19
Poemoj de Attila *Hlavathy* 20
Knichal, O.: Pensoj pri la kritiko 20
Nemere, I.: Ĉevalo 20
László, F.: Medioprotektado en Hungario (Tr. A. *Pechan)* 21
Gergely, M.: Konversacio kun S. *Maller* 27
Szabó, M. R.: Revuo de revuoj 28
Por la paco (d-ro I. *Nagy);* Korespondi deziras 29
Paĝo de FERI 30
Ŝakrubriko 31
Kalendaro, humuro 31
Leterkesto 32

Sur la titolpaĝo: Rákóczi la II-a (Pentraĵo de Ádám Mányoki.)

RÁKÓCZI

300-jara jubileo de lia naskiĝo

Ferenc Rákóczi la Dua, reganta princo en Hungario kaj Transilvanio — ido de Transilvaniaj princoj el familioj Rákóczi kaj *Báthory* (unu el lasta ankaŭ pola reĝo) — havis vere malfacilan infanaĝon. Estis dekjara, kiam li travivis jam plurajn sieĝojn meze de la familia bienego en fortikaĵo Munkács (nun Mukaĉevo en Soveta Ukrajno), kies defendon komandis lia patrino, Ilona *Zrínyi,* mem deveninta el familio de naciaj herooj kaj kontraŭ-Habsburgaj martiroj. Je ordono de la Viena imperiestro la infano estis edukita en jezuita klostro, fore de la patrino, por poste studi en Universitato de Prago. La junulo vidis la aŭstran subpremon en sia patrujo, apenaŭ tolereblan, kaj komence de la 18-a jarcento jam iniciatis kontakton kun *Luizo la XIV-a* por akiri helpon al Hungario, okaze de ribelo.

Liaj leteroj estis denuncitaj en Vieno; la juna princo arestita alvenis en prizonon de Wienerneustadt, suferi eble mortpunon kiel la avo, ĝuste tie. Kolora aventuro sekvis: post interamikiĝo kun la gardistoj li gastigas ilin, kaj kiam jam ebriaj, amika oficiro alportas soldatuniformon: eblecon por fuĝi. Ekstere atendas kaleŝo, aliloke rapidaj ĉevaloj, helpemaj manoj, por eviti la multajn persekutantojn dum longa vojo al Pollando. Tie li trovas sekretan rifuĝejon kune kun bravaj amikoj.

Pola ministro skribis en Epistolo, eldonita en 1710*:

„Rákóczi havis grandan kuraĝon, decidemon, kaj helpis lin ankaŭ lia denatura lerteco kaj aliaj eminentaj talentoj dum la tre riska kaj malfacila entrepreno... Kaj revokita en sian landon pere de fideluloj... nobeloj kaj nenobeloj amase ariĝis sub liaj standardoj. Kvankam sen armiloj, mono kaj ceteraj necesaĵoj li komencis la militon, li direktis la aferojn ege lerte, kaj feliĉe, ke baldaŭ nenio bezonata mankis al li... Sub lia gvidado la hungaroj naŭfoje entreprenis grandajn batalojn..., kvinfoje venkis, ne menciante la malpli gravajn multajn batalsukcesojn."

Rákóczi mem, verkisto en pluraj lingvoj, tiel mencias la insurekcion:

*„Pro granda entuziasmo kaj amo, ĉi tiu popolo, mizera kaj ĉifona, forlasis la familion, kaj aliĝis al mi kiel soldato. Manke de pafiloj ili prenis glavojn, fojnoforkojn kaj falĉilojn, promesante, ke ili volas vivi aŭ morti kun mi... Tiu subita kaj fervorega kampular-ribelo terurigis la nobelaron, kiu pro timo retiriĝis en siajn fortikaĵojn kaj kastelojn... (sed baldaŭ) ankaŭ la nobelaro grandamase venis en mian tendaron."***

La Pariza gazeto *„Mercure Galant"*** skribis tiutempe:

„La imperiestro, nekapabla armile venki la malkontentulojn, manipuladas tere kaj ĉiele por igi ilin demeti la armilojn, sed vane. En tia situacio, atingita pere de la kuraĝe brava direktado de Rákóczi, estus malsaĝo kaj malkuraĝeco demeti la armilojn."

La menciita pola ministro skribas:

"...tiu princo, havanta tiom da eminentaj kvalitoj, ŝajnas

---

* *EPISTOLO DE POLA MINISTRO AL IU SINJORO DE L'IMPERIO pri aferoj de Hungario, 1710. Verketo eldonita plurloke en Pollando kaj Francio, france, ankaŭ latine.*

** *MEMORAĴOJ de Fr. Rákóczi (eldonita franclingve en Hago 1737).*

*** *MERCURE GALANT revuo, n-ro Oktobra 1705, Parizo.*

*vivanta portreto de la fama Mátyás Corvin.**** Ambaŭ estis neleĝe trenitaj en Vienon por perforta morto. Sed Ferenc savis sin pli mirakle... kaj el prizono venis al trono, ne kiel reĝo, sed kiel patro de la patrolando."*

La komparo trafas, ankaŭ en tiu senco, ke ambaŭ regnestroj, kvankam feŭdalaj, apogis sin politike ankaŭ sur la popolo. Klera absolutismo karakterizis ilin; tio estis certe necesa por Rákóczi dum *organizado de la financoj, de la industrio* por ekipi kontentige sian grandan armeon. La grandtalenta armeestro montriĝis samtempe moderna, progresema organizanto — en medio ankoraŭ tro malmulte burĝeca.

Li, plej riĉa grandbienulo en Hungario, alte elstaris el inter la feŭduloj, el la malprogresema, feŭda mondo. Liaj vere senegoisma konduto al la servutularo, *toleremo* al ĉiuj religioj (kvankam pia romkatoliko), klopodo likvidi la ekonomian postrestintecon — montras fortan, siatempe tre modernan, burĝecan tendencon!

**** *Reĝo Mátyás (1443—90), la plej alte taksita kaj popular; filo de János Hunyadi, fama armeestro kontraŭ la turkoj. Pri lia blazonbirdo, la korvo, titolita ankaŭ Corvinus.*

Naskiĝdomo de Rákóczi en Borsi (departemento Zemplén)

Ilona Zrinyi, patrino de Rákóczi

Princo *Saint-Simon* jam en Versajlo konatiĝis kun la formigrinta Rákóczi, kaj en la famaj *Memoraĵoj* rakontas pri intimaj ligoj kaj priparoladoj inter la ekzilita princo kaj la *Sun-reĝo;* li prezentas ankaŭ interesan *portreton:*

„Rákóczi havas tre altan, muskolan staturon, tamen ne estas dika, sed havas tre proporcian kaj belan figuron, aspekton fortikan kaj tre imponan, sen ia krudeco. Homo tre modera, modesta, de nobla konduto kaj komplezemo; tre ĝentila, sed samtempe konscie elektema. Entute li estas saĝa kaj bonintenca, homo brava kaj vere kuraĝa; interrilatas kun ĉiu ajn senfiere kaj — kio troviĝas malofte kune — dignoplene, per nenio sentigante sian gloron... en la societa vivo li estas aminda kaj agrabla..."

Post kvinjara restado ĉe la franca kortego, la sultano invitis lin al Turkio por partopreni eventualan militiron kontraŭ la Habsburg-imperio. Tamen la internacia situacio malhelpis tion, kaj de tiam Rákóczi vivis kun fidela sekvantaro ĉe bordo de la Marmora Maro, en urbeto *Tekirdag (Rodoŝto).*

Ankaŭ dum tiu lasta vivperiodo konsekvence montriĝis la karaktero de la granda princo: modera, disciplina ĉiutaga vivo kun regula manlaboro kaj skribado; modesta kontaktado kun la cetera mondo, kun la foraj reĝaj kortegoj; multe da meditado kaj ĉiama sopiro al la neniam plu revidota patrujo. En la fora, fremda lando atingis lin la morto, antaŭ lia sesdekjariĝo. Tamen, lia persono eterniĝis en la koro de la popoloj de Hungario, kiel unu el la plejgranduloj de la lando.

E. *Fenyvesi*

Kiel la samtempuloj vidis

„Princo Rákóczi laŭ nacieco estas hungaro, laŭ religio katoliko; alta, belstatura, ĉirkaŭ tridekkvar-jara viro; lia hararo estas bruna, la vizaĝo belforma, okuloj viglaj; li estas bela viro kaj bona rajdanto; li havas multe da sprito kaj kompreno, lia juĝkapablo elformiĝis certe pro la suferitaj peripetioj de lia fatala vivo; insiste li rigardas en vizaĝon de tiuj, kiuj la unuan fojon proksimiĝas al li; li parolas plurajn lingvojn — france kontentige bone. Ĉar li estas tre saĝa kaj dokta, li povas konkordigi la religiojn de Hungario por la intereso de la farindaĵoj. La hungaroj, ĝenerale ĉiuj, amas kaj estimas lin; ĉefe liaj generaloj, kiujn li rigardas kiel siajn fratojn, kaj kiuj respektas lin kvazaŭ reĝon. Ĝuste tial li tre zorgas por harmoniigi iliajn interesojn; li estas ilia komprenema komandanto, kiu eventuale severe punas, precipe ne tolerante la ebriiĝon. Li mem estas tre modera, kaj ne toleras malŝparon ĉe sia tablo, al kiu cetere li lunde neniam sidiĝas: tiun ĉiusemajnan fastotagon li postulas ankaŭ de la aliaj, je memoro de lia liberiĝo ĉi-tage el la Viena malliberejo. Li vekiĝas ĉiam tre frue, kvar-kvin horojn laboras ĉe la skribotablo, kaj poste okupiĝas pri ekzercado de la trupoj, por planti en ilin siajn naturajn trajtojn, la kuraĝon kaj grandanimecon."

(De l'Hommeau: Memuaro pri vojaĝo en Hungario.)

„Rákóczi estis homo vere brava, ĝentila, justa kaj kuraĝa; profunda kredanto, kvankam tion li nek montris, nek kaŝis, ĉar ankaŭ en tio li estis modesta. Li donis sekrete al mizeruloj multe, kaj pasigis per preĝado longan tempon. Lian grandan personalon li estris severe, sed milde, ne nur ilian honestan konduton, sed ankaŭ la elspezojn, kiujn li mem kontrolis, zorgante precize eĉ pri la salajroj. Estis familiara, treege bona kaj aminda viro."

(Princo Saint-Simon: Memoraĵoj.)

SÁNDOR PETŐFI

RÁKÓCZI

Sanktul' de patri', estro de libero,
ho, Rákóczi, se vin ni memoras,
en malhela nokto brila stelo,
ni ekflamas arde kaj ekploras!

Baldaŭe jam triumfon festos
kies soldat' vi estis, la afer',
tamen ĉi venkon vi ne ĉeestos,
vi ne forlasas profundon de ter'.

Viajn cindrojn por porti al hejmo
al via tomb' ni pilgrimi volas,
sed kie vi ripozas por eterno,
kie la tomb'? Ja neniu konas.

Ekzilitis vi de via gento,
eĉ via nom' estis en ekzil', do
ruinigis ŝarĝo de jarcento
vian tombon, peze kiel ŝildo.

Sed animo via restis, ho, ja
animon tian ne trafas la fal',
flugu al ni kun spirit' heroa
se komenciĝos poste la batal'.

Gvidu nin en mano kun standardo,
kiel vi gvidis armeon iam,
plenigu nin per transmonda ardo,
plifortikigu koron nian!

Kaj kuregas ni al malamiko,
eĉ, se retenus cent manoj karaj,
se mortoj cent estos por timigo,
ni neniam estos malkuraĝaj,

Kaj se triumfan tagon ni festos
de libero brilanta en gloro,
milionoj ĝojkrie atestos:
finis do: la iniciatoro.

(1848)

Tr.: Márton *Fejes*

KIAM RÁKÓCZI IRIS EN POLLANDON

Do, adiaŭ Hungarlando!
Rifuĝejon en Pollando
mi devas jam por mi serĉi,
devas mi foriri el ĉi.

Ja mi kian pekon faris,
ke l'hungaron tiel amis?
Sed li sur min metis noce
Katenojn striktajn feroce.

Mi avertis la hungaron,
ne fidu plu la germanon,
al ni trudus por futuro
li sorton de almozulo.

Venontjare vi ja spertos,
kvankam jam malfrue estos,
Rákóczi-n vi primemoros,
lin serĉante vi priploros!

Tr. Bella *Sipos*

Mi komencis la liberigon de mia patrujo instigite pro suferegoj de la mizera popolo kaj pro miaj propraj suferoj

(F. Rákóczi: Memoraĵoj)

Eŭropo kaj la liberecbatalo de Rákóczi

Fine de la 17-a jarcento estis ĉesigita la 170-jara turka reĝimo, kiu subpremis pli ol duonon de la tiama Hungario (la baseno de la Karpatoj). La Eŭropaj armeoj rekonkeris la fortikaĵon de *Buda* (1686), kaj poste la venkantaj *Habsburgoj* etendis sian regadon super la tuta lando. Ilia politiko, igi la landon ekspluatinda kolonio, provokis plurfoje jam dum la 17-a jc. armitajn kontraŭstarojn de la popolo *(Bocskai,* Gábor *Bethlen, Thököly).* Tiuj militiroj havis fortan bazon en *Transilvanio* (princlando inter la orientaj kaj sudaj Karpatoj), kiu dependis de la sultano, tamen aŭ ĝuste tial ĝuis interne liberecon kaj ekonomie, kaj religie. Sed nun la Viena kortego despote subpremis ankaŭ Transilvanion kaj la tuta lando pleniĝis de plendoj kaj rezistoj.

*„Netolereblaj postuloj kaj kontribuoj senigis la simplan popolon de siaj etaj valoroj; pro malespero senpova estis iuj, kiuj pendigis sin, aliaj fuĝis al la turkoj por servi ilin, iuj eĉ donis la edzinon al la ekzekucistoj kaj la infanojn al turko por garantiaĵo ... Eĉ la turkoj kondutis pli milde al la popolo ol la aŭstroj, kiuj forprenis dum unu jaro tiom, kiom estis pagita al la turkoj dum 50 jaroj."**

Tiutempe novaj ventoj ekskuis la malnovan feŭdisman Eŭropon, alvenintan al sojlo de la kapitalismo. La ekonomie plej evoluintaj landoj, *Nederlando* **kaj** *Anglio* jam trairis la burĝan revolucion; la krizo de feŭdismo prezentis sin ankaŭ en aliaj landoj pro la forta evoluo de la produktado, la ekonomia progreso de la burĝaro, sekvata de novaj ideoj.

En *Francio* la reĝo *Luizo la* XIV-a klopodis modifanta konservi la feŭdismon. Detranĉi iom el la feŭdaj privilegioj, subteni — je profito de la ŝtato — la burĝan evoluon, sed samtempe limigi ĝin, estis certe politiko progresema. Tion intencis sekvi i. a. *Petro la Granda* en *Ruslando,* kaj en Mez-Eŭropo la Habsburg-imperio. Sed tiu tre miksa imperio malhavis la nacian unuecon (kiun havis Francio), ĉar ĝi subjugis tre diversajn, plejparte ne-germane parolantajn popolojn. Por ili la centralisma kaj absolutisma politiko venis de *fremda* dinastio, detranĉoj de privilegioj kaj modernigo de ŝtataparato aperis kiel kontraŭnaciaj turmentoj.

*„Renoviĝis malnovaj vundoj de la nobla hungara nacio ... La ŝtataj oficoj estis donitaj kontraŭleĝe al fremduloj ... Kortega konsilio prenis por si la regadon, kaj la hungaraj sinjoroj estis de tie eligitaj ... La enspezoj de la grandbienuloj grave malpliiĝis pro agoj de aŭstroj ... Ĉefpastroj, aristokratoj, nobeloj kaj liberaj urboj, ĉiuj ordoj de la lando estis netolereble ŝarĝitaj per nekutimaj impostoj daŭre kreskantaj ..."***

„Nenegebla fakto estas, ke okazis en Hungario kaj Transilvanio en ekleziaj kaj politikaj sferoj multaj perfortaj kaj neleĝaj agoj, servantaj certan tiranecan politikon, kaj precipe kontraŭ tiuj, kiuj ne apartenis al la romkatolika eklezio kaj rifuzis ĝin surprenĉ."***

La brutalaj manieroj de la koloniigo frapis unuavice la kampularon, kiu nove kaj denove prenis armilon kontraŭ la fremduloj. Ĉion perdintaj servutuloj, fuĝintaj soldatoj, slovakoj, ukrajnanoj, rumanoj kaj hungaroj kolektiĝis en arbaroj, marĉoj. Ribeloj ekflamis. Pro memoro de la fama kamparano-ribelo de *Dózsa* (1514, vd. HV 72/4.) ili nomis sin same *krucistoj,* hungare: *kuruc*-batalantoj.

Estis ili, la servutuloj, kiuj la same persekutatan *Franciskon Rákóczi,* princidon de glornoma familio serĉis en sia rifuĝejo en Pollando, kaj petis lin hejmenveni kaj *preni la komandon de la ribelo.* Rákóczi cedis al la kampulodelegitoj, sendis per ili standardojn kun surskribo: PRO LIBERTATE (por la libereco), kaj dissendis *proklamon:*

„Ĉiu patrioto, nobelo kaj nenobelo, deziranta la tradician liberecon de la dolĉa patrujo ... prenu armilon kontraŭ la leĝojn despote tretanta, kontribucianta, panon-salon deprenanta, rabema, tirana, kruele turmentanta imperio"! (1703).

Germana ĵurnalisto notis tiutempe:

*„Certe la ribelo de princo Rákóczi komence ŝajnis tre malgrava, eble nur kun cento da homoj; sed rapide amplekŝiĝis la vicoj kaj baldaŭ tuta armeo kolektiĝis: fine de 1703 liajn kavalieron kaj infanterion konsistigis 32 mil homoj, ĝi havis signifan artilerion, kiu kreskis ankoraŭ ĉiutage."****

La liberec-batalo ekflamis en konvena *internacia situacio.* De 1701 daŭris *Eŭropa milito* por la hispana trono, por ties valoregaj kolonioj, precipe inter Luizo la XIV-a kaj la Habsburgoj. La ekspansiema Anglio kaj Nederlando batalis en koalicio kun la Habsburg-imperio kontraŭ la tro potenca franca reĝo. Memkompreneble, *Rákóczi prenis interligon kun Luizo,* al kiu estis avantaĝa la kuruc-milito dorse de la Habsburgoj. Tial Luizo klopodis utiligi ĝin por sia intereso, eĉ helpante

---

* *Memoraĵoj de Fr. Rákóczi (eldonita en Hago, 1737).*

** *Manifesto de princo Rákóczi (1703, eldonita en pluraj gravaj lingvoj).*

*** *Die Rakozische Kriegs-Flamme (Köln, 1704). La Rákóczi-militflamo. Habsburg-amika pamfleto de K. Scharschmidt.*

Batalo inter kurucoj kaj labancoj

finance kaj per milit-ekspertoj, malgraŭ la granda distanco.

La militsukcesoj de la kuraĝa kuruc-armeo — precipe de la malpeza kavaliero — rezultis, ke dum du jaroj la tuta lando liberiĝis de la fremda potenco, almenaŭ provizore. Krom heroeco de la kampularo, tion sukcesigis ĉefe la progresema, saĝa politiko de Rákóczi, celanta kunigi *en tutnacia fronto* ĉiujn klasojn kaj fortojn kontraŭ la komuna malamiko. Portempe la defendo de la nobelaj privilegioj koincidis kun defendo de la nacia sendependeco, necesega por socia progreso. La militantaj servutuloj estis absolvitaj de feŭdaj depagoj, regis religia toleremo; ne mirinde do, ke preskaŭ ĉiu subpremita popolo en Hungario solidare partoprenis la liberec-batalon.

La nacia unueco klare reliefiĝis en la tutlanda asembleo (1705, *Szécsény)*, kie la konfederaciitaj ordoj elektis regnestron por la kuruca ŝtato: Rákóczi iĝis *„gvindanta princo"*. Du jarojn poste, surbaze de pluaj gravaj venkoj, la asembleo unuanime *detronigis* la Habsburg-dinastion en la hungara reĝlando; la regado de Rákóczi firmiĝis. Malgraŭ tiuj rezultoj, la klasbatalo ne povis ne vigliĝi:

*„La nobelaro de tago al tago reprenis pli da potenco super siaj servutuloj, kaj malinklinigis ilin al la milito, por laborigi ilin je bienula profito . . . Neniel mi kapablis reĵeti tiun leĝon, kiu rajtigis ĉiun bienulon de Transilvanio repostuli el la armeo siajn senpermese aliĝintajn servutulojn . . . tio baldaŭ ruinigis miajn Transilvaniajn trupojn."**

La situacion vane provis reboni-igi dekretoj en intereso de la kampularo, promesantaj eĉ „eternan liberecon" al la ĝisfine batalantaj servutuloj. La interna malkonkordo de la bienuloj, ilia egoismo malfortigis la popolan fundamenton de la nacia batalo. En la lastaj jaroj inflacio, prezaltiĝoj kaj varo-mankoj neniigis la antaŭajn prosperadojn ekonomiajn. La pli bone ekipita kaj trejnita Aŭstria armeo iom post iom superis kaj plurfoje venkis la kuruc-trupojn. Pli kaj pli da grandbienuloj cedis al logoj de la Viena kortego, kaj pro bieno-promesoj pluraj perfidis kaŝe aŭ malkaŝe la sendependecon.

Aldoniĝis la malfavora evoluo de la internacia situacio: la francaj kaj bavaraj armeoj estis venkitaj far la Habsburg-armeoj. Ne sukcesis la kuraĝa militiro de la kurucoj al Silezio por unuiĝi kun la prusa armeo. Kiam montriĝis espero kunbatali kun Petro la Granda, la franca hezitado ligi aliancon kun la caro — dumtempe atakita jam de Turkio — dissolvis ankaŭ tiun planon. En 1711 la restoj de la kuruca armeo demetis la armilojn. Rákóczi kun la plej fidelaj kaj obstinaj personoj forlasis la landon, iris al Pollando, iom poste al Parizo.

Per la packontrakto en *Szatmár* la feŭdaj ordoj rericevis sian aŭtonomion, la nobelaro savis siajn bienojn, sed *perdiĝis la sendependeco de Hungario!* Kaj lige kun tio, neniiĝis la promesita libereco de la servutuloj, kiuj tiom longe batalis por la nacio dum tiu glora epoko. Ĝi leviĝas alte super la ĝistiamaj naciaj luktoj: restis porĉiame tre ŝatataj kaj popularaj la kurucaj tradicioj, herooj, historioj de bravuloj — karaj temoj por ĉiuj artoj. Inter la entuziasmigaj kuruc-kantoj atingis pli vastan, internacian konatecon la fajra-ritma *Rákóczi-marŝo,* grandioze orkestrita de *H. Berlioz;* aŭskultante ĝin oni vive sentas la heroecan spiriton de la kuruca epoko.

Ervin *Fenyvesi*

Gyula Krúdy

La sonorilego de Rákóczi

Ádám Mányoki: Ferenc Rákóczi

Tiel granda sonorilego eble ne ekzistas alie en la mondo, kiel la Debrecen-a olda sonorilego. Tiun oldan sonorilegon — fieraĵo de la debrecenanoj — oni nomas: *Rákóczi.*

La olda sonorilego diferencas de la ceteraj ne nur en tio, ke por ĝia ekpuŝo necesas almenaŭ tri homoj, sed ankaŭ en tio, ke ĝi eksonas nur dum granda festo. Kiam ĝia malalta, muĝa voĉo eksonas en la urbo, eĉ la bovisto de *Hortobágy* ekaŭdas ĝian sonon kaj diras en si mem:

— Rákóczi parolas!

Laŭtradicie la vorto de Ferenc Rákóczi enestas en la muĝo de la granda sonorilego. La voĉo de la liberecprinco flugas tra la ebeno de *Hortobágy,* se oni eksonigas ĝin.

La historio de ĉi tiu granda sonorilego ja estas jena. Ĉu mi aŭdis aŭ sonĝis tion? — egalas. Kiu aŭskultas la voĉon de la „*Rákóczi*", tiu kredas fidinda mian rakonton.

Kiam Ferenc Rákóczi la Dua ekiris al sia mizera kašvagado, adiaŭinte hejme aeron, akvon, arbofolion, li kvazaŭ estus sentinta, ke li neniam plu ekvidos sian karan landon.

— Sed almenaŭ mia voĉo restos ĉi tie en la sono de la kara „*tárogató*" — diris la princo.

La „tárogató"[1] estis muzikinstrumento de la *kurucoj.* Ili uzis ĝin dum la tendarfajroj, eĉ dum amuzfestenoj ili dancis laŭ sono de la tárogató. Tárogató estis la muziko de la libero.

Ankaŭ la malamiko sciis tion. Kiam Ferenc Rákóczi formigris el sia patrio, la malamiko proklamis, ke oni devas frakasi ĉiun tárogató-n. Oni devas forbruligi ilin! Restu nenio el la danĝera instrumento, nur cindro.

La ordono de la malamiko estis plenumita. Kiu ne obeis, tiun oni senkapigis.

Do eĉ la voĉo de Rákóczi ne restis hejme.

Kiam oni sciigis la princon, ke lia kara tárogató estis forbruligita, la ermito de *Rodošto* ekĝemis:

— Post tio mi vere ne scias, kiel la hungararo ekaŭdos mian voĉon!

Samtempe okazis, ke la debrecenanoj muldigis novan sonorilegon. Ili havis ankaŭ tiam sonorilegon, sed nur tian etan, kies sonon oni ne aŭdis eĉ en la najbara strato. Do la debrecenanoj decidis, ke ili farigos tian sonorilegon, kies voĉon eblas aŭdi eĉ en la najbaraj vilaĝoj. Eksciu ankaŭ la paŝtisto de Hortobágy, kiam estas tagmezo.

La sonorilego fariĝis preta. La tuta urbanaro rigardis ĝin mire. Ili ankoraŭ ne vidis tian sonorilegon. Ĝi estis tiel granda, kiel vilaĝa domo. Ĝian batilon eĉ kvar ĉevaloj apenaŭ povis fortiri.

— Ĉi tiu estas *la* sonorilego! — ili diris. Oni ekaŭdas eble eĉ en *Nagyvárad,*[2] se ĝi sonas. Do aŭdu ili! Ili eksciu, ke la debrecenanoj havas monon por tia sonorilego.

Ĉar la Debrecena loĝanto havas nenian alian zorgon krom kolerigi Nagyvárad-on. Ili konkuras reciproke jam de jarcentoj. Se la nagyvára-danoj konstruis turon, la debrecenanoj konstruis eĉ pli altan turon.

Do la debrecenanoj estis fieraj, ke ili „superis" Nagyvárad-on per sia granda sonorilego. Nun jam leviĝis la demando: kian nomon oni donu al la sonorilego? Oni kutimis bapti ankaŭ la sonorilegojn, kiel la novnaskitojn.

La urba konsilantaro komencis pripensi la aferon. Unue ili pensis pri tio, ke oni nomu la sonorilegon laŭ la nomo de la urbestro Mihály *Szakolczai.*

— *Sinjoro* Mihály Szakolczai — korektis la urbestro.

Jes, sed kiel eblas nomi sonorilegon „sinjoro"? Ne eble! La tuta urbanaro, eĉ la porkopaŝtistoj menciadus la sinjoron urbestron nur Mihály Szakolczai. Oni forĵetis la planon.

Tiam unu el la urbaj konsilistoj frapis sian frunton:

— Ni nomu ĝin Johano! Ja tiom da Johanoj estas en Debrecen.

Iu alia konsilisto interkriis:

— Kaj vi estas Johano, kaj mi, — estu do ankaŭ la sonorilego Johano!

Pri tio ili konsentis.

Poste okazis, kiam oni suprentiris la sonorilegon en la turon, ke subite ĉirkaŭkuris en la urbo la famo: Ferenc Rákóczi mortis en Rodošto, en la pasinta monato!

Tiam la sonorilego eksonis. Ĝi muĝis tiel malaltsone, tiel malgaje, ke ĉiuj homoj kortuŝiĝis... Rákóczi mortis! Lin priploras la sonorilego.

La urbanaro intersufloris: la animo de Rákóczi sonas el la sonorilego...

La grandioza sonorilego sonis, sonis... Le hejmenfluginta animo de Rákóczi migris tra la hungaraj kampoj per la voĉo de la sonorilego.

Trad. István *László*

Glosoj:

[1] *tárogató: malnova hungara blovinstrumento ligna, parenca al klarneto.*

[2] *Nagyvárad: urbo sur la granda Hungara ebenaĵo, nun Oradea en Rumanio.*

Te vagy a legény...

Malrapide. Kuruca soldatkanto.

Lassan. Kuruc dal.



Haj kuruc amik', kara kamarad'!
Decas al bravul' gaja sintenad'!
Estu drinko, estu danco, festa festenad'
Ĝi ne grošojn, sed talerojn kostos, kamarad'

Kara ne estas nia sango flu'
Du tri grošoj nur gia taga lu',
For la monon, poste fluu nia sango plu
Por patrujo unu, inter malamikoj du.

Csinom Palkó...

Vigle. Kuruca* soldatkanto el la XVII-a jarcento.

Élénken. Kuruc dal



Paŭlo brava, Petro brava kara kamarado.
Boto ruĝa, spron, arĝenta decas al dancado.
[:Trinku sanon, trinku gajon
El la fajra vine
Saltu, kriu, dancu ĉiu
Kun la karulino.:]

Tradukoj de K. *Kalocsay*

JÓZSEF LÉVAY

MIKES

Aŭskultas mi sola de l' maro murmuron,
super marŝaŭmo la bruantan ventkuron, —
restinta mi sola
rifuĝint' izola
en Turkio granda!...
Se nur la animo de Rákóczi morta
ne ŝvebas en koler' de la maro, forta,
ĉielon batanta!

Folioj faladas de la arboj dise,
vent' aŭtuna tiujn dispelas kaprice.
Estas forfluganta
la birdeto kanta
el Turkio granda!...
Sed mi kien iru, flugu kien for, do
en kiun angulon de ĉi vasta mondo
el patrio fremda?

Pala stelo vojon al Zágon proponas,
kie la rok-fruntojn neĝ-diadem' kronas,
kaj tie submonte
ekfloradas pompe
la printempaj floroj...
Al Transilvanio, kie flugas bunte,
papilie sur florojn miaj abunde
junaĝaj memoroj.

Kial do naskoter', flugi mi ne povas
al vi, ja eĉ viajn arbustojn mi konas!
Kial vi toleras
jugon, kaj suferas
longe en sklav-sorto?
Vane mi ekirus, retenas min sorĉa
rava, ĉarma mano de libero dolĉa.
Retenas ĝis morto...

Mi manĝas panon de la turka sultano,
noti miajn dirojn sekretpolicano
por spion-atesto
al mia fenestro
ja neniam iras;
Arbo en solec' mi estas; per turmento
fulmfrapoj min batas kaj tempesta vento, —
sed libere spiras!

Aŭskultas mi sola de l' maro murmuron,
super marŝaŭmo la bruantan ventkuron —
restinta mi sola
rifuĝint' izola
en Turkio granda,
Ĉirkaŭ mi l'animo de Rákóczi morta
ŝvebas en kolero de la maro, forta,
ĉielon batanta!

Tr.: Márton *Fejes*

Kelemen Mikes

LETEROJ EL TURKIO

Kelemen Mikes, filo de Transilvania nobela familio, naskiĝis en 1690. 17 jara, li fariĝis kortega paĝio de la Transilvania princo Ferenc Rákóczi la II-a, gvidanto de la unua kontraŭ-Habsburga liberec-batalo de la hungara nacio.

Post la falo de la liberec-batalo, kun granda amo kaj senkompara fideleco li sekvis sian sinjoron tra Pollando al Francio kaj de tie al Turkio, kien la sultano invitis Rákóczi-n, oferante azilon al li kaj al lia akompanantaro. Dum la kvarjara restado en Francio Mikes konatiĝis kun la francaj kulturo kaj klereco.

Rákóczi iris esperplene al Turkio, kredante, ke la sultano, kiu estis tiam en milito kontraŭ la germana imperiestro, helpos lin liberigi Hungarlandon. Sed la belaj esperoj vaniĝis. La povraj senpatriuloj devis rezignacii antaŭ sia sorto senkompata.

Post la morto de sia princo, Mikes vivis ankoraŭ 27 jarojn en la Turkia ekzilo, malproksime de sia amata naskolando. De 1717 ĝis 1758 li verkis 207 „leterojn" al imagita fratino. Tiuj leteroj, raportantaj pri okazaĵoj de 40 ekzilaj jaroj, estas perleroj de la tiama hungara literaturo. El tiuj leteroj ni prezentas kelkajn detalojn.

I.

Gallipoli, Anno 1717. 10 Octobris

Kara fratino, dank' al Dio, bonŝance ni alvenis ĉi tien; el Francio ni forvojaĝis la 15-an de septembro. Nia princo dank' al Dio havus bonan sanon, se la podagro adiaŭus lin, sed ni esperas, ke la turka aero forpelos ĝin.

Kara fratino, kiel bone estas iradi sur la tero. Ĉu vi vidas, eĉ sankta Petro ektimis, kiam liaj piedoj komencis sinki en la akvon: kiom pli timis ni, pekuloj, kiam nia ŝipo turniĝis de unu flanko al la alia inter ondoj, grandaj kiel la Transilvaniaj montoj — jen ni iris sur ilia supro, jen ni falis en tiel grandan valon, ke ni atendis nur, ke tiuj montoj falos sur nin; tamen ili estis tiom indulgaj, ke donis al ni trinki ne pli ol necese. Fine, ke ni estas ĉi tie, sanaj, ĉar ankaŭ sur la maro oni malsaniĝas, ne nur sur la tero, — kaj se ĉi tie la kaleŝo skuas nin, oni laciĝas kaj havas pli bonan apetiton al la manĝo. Sed en la ŝipo tiu konstanta tremado kaj ŝancelado turnas la kapon, kirlas la stomakon kaj oni kondutas kiel ebria homo, kiu ne povas digesti la vinon. Ankaŭ mia povra stomako devis trasuferi tiun malbon-farton dum la du unuaj tagoj, sed poste mi devis manĝi kiel lupo.

Nia princo estis ankoraŭ sur la ŝipo, kiam oni portis al li la donacojn de tatara ĥano, kiu estas ĉi tie en ekzilo. Inter la donacoj troviĝis bela selita ĉevalo. Al la princo oni donis bonan loĝejon, sed ni estas aĉe loĝigitaj, tamen prefere mi estas ĉi tie ol sur la ŝipo...

II.

Gallipoli, 21. Octobris 1717.

...Mi pensas, ke morgaŭ ni forlasos tiun ĉi dezertan, malĉarman, tristan loĝlokon, ĉar jam alvenis la ruĝa kaleŝo de la sultano, kiun oni sendis por nia sinjoro. Tial mi nomas ĝin ruĝa, ĉar ekstere ĝi estas tegita de ruĝa drapo, sed la nomon kaleŝo ĝi ne meritas, ĉar nur veturilo ĝi estas. Kvar blankaj ĉevaloj kutimas tiri ĝin, kiujn troti oni jam ne trudas, ĉar ili jam forgesis tion, tiom maljunaj ili estas: la kvar aĝas kune ne malpli ol 80 jarojn...

VI.

Drinapolo, 12. Decembris 1717.

...ni estas ankoraŭ ĉi tie, kaj ankaŭ plu ni restos, sed ankoraŭ ne sciante kion fari. Ankoraŭ ni ne satiĝis de enuo, kvankam ni estas jam proksime al tio. Ĉar ni ne venis ĉi tien por pasigi multe da tempo kaj nur ĉasadi sur belaj, ebenaj herbejoj de Drinapolo, sed por ĉesigi nian ekziliĝon. Sed la espero komencas frostiĝi en ni. Estas fakto, ke ankaŭ la tagoj estas malvarmaj kaj ni loĝas en malvarmaj domoj...

XVI.

Drinapolo, 15. Aug. 1718.

Jen, kara fratino, mia lasta letero el tiu ĉi imperiestra urbo. Ĉi tie ni jam manĝis la destinitan stokon da pano. Ni iros plu, sed ne antaŭen, sed malantaŭen, al tiu stoko da pano, kiu atendas nin apud Konstantinopolo, ĉar kion ni timis, en tion ni falis ĝis la kolo — kiu eltiros nin el ĝi? Nur Dio. Antaŭ kelkaj tagoj oni alportis la sciigon, ke la veziro kontraktis dudek-kvar-jaran pacon kun la germanoj... La paco estas farita, ĉi tie ni havas jam nenion por fari, pro tio jam morgaŭ oni ekirigos nian sinjoron al la ĉefurbo. Ni jam forte pakadas. Oni donis al ni sufiĉe da veturiloj, eble pli ol necese: ĉar ja vi povas prijuĝi: ĉiun mian havaĵon mi metis en kvaronan parton de malgranda veturilo...

XXXVII.

Rodoŝto, 28. Maji 1720.

...ĉi tie ni estas en belsitua loko. La urbo estas meze granda kaj bela. Ĝi kuŝas ĉe la marbordo sur ĉarma vasta deklivo. Ankaŭ tio estas fakto, ke ni troviĝas ĉe la rando de Eŭropo. Rajde dum du tagoj facile oni alvenas Konstantinopolon; surmare dum unu tago. Vere, ke pli bonan loĝlokon oni ne povus doni al la princo. Al kiu ajn direkto oni ekiras, ĉie belaj kampoj, sed ne dezertaj, ĉar ĉi tie ĉiun teron oni kultivas. ...Jam sufiĉe mi parolis pri la urbo kaj ĝiaj kampoj; mi devas jam paroli pri la kutimo en nia domo kaj pri la pasigo de la tempo. Vere, ke eĉ en monaĥejo ne estas pli rigora tagordo ol en la domo de la princo. Tiu tagordo estas la jena: Matene, je la kvina kaj duono oni ekbatas la tamburon. Tiam la servistoj devas ellitiĝi kaj pretiĝi ĝis la sesa. Je la sesa oni tamburas, tiam la princo vestas sin — poste eniras la kapelon kaj aŭskultas meson. Post la meso li iras en la manĝo-ĉambron, tie ni trinkas kafon kaj fumas. Kiam la horloĝo montras tri kvaronojn antaŭ la oka, tiam oni tamburas unuan fojon por la meso. Je la oka la duan fojon kaj baldaŭ sekvas la tria tamburado, — tiam la princo iras al meso, post meso li iras en sian apartamenton kaj ĉiu disiras laŭplaĉe. Je duono antaŭ la dekdua oni ekbatas la tamburon, je la dekdua ni altabliĝas kaj faras tribunalon super la kokinoj. Je duono antaŭ la tria la princo iras sola en la kapelon kaj tie li estas ĝis la tria. Kiam la horloĝo montras tri kvaronojn antaŭ la kvina, oni tamburas unuan fojon por la vespera preĝado. Je la kvina la duan kaj baldaŭ la trian fojon — tiam la princo iras en la kapelon, poste ĉiu disiras. Por vespermanĝo

Ádám Mányoki: Kelemen Mikes

restis 9 monatoĵn — rim de la trad.) hieraŭ foriris kaj sur franca ŝipo li ekveturis al Francio. Mi trovas lia plej granda manko, ke li ne parolas hungare. Sed tio ne estas lia kulpo. ... Nia sinjoro, kiu tre amas siajn filojn, malfacile disiĝis de li ...

... Estas bezonata la donaco de Dio al tio, ke oni povu tiel utiligi la tempon, kiel nia sinjoro. Ĉar ĝis tagmanĝo li pasigas la tempon per legado kaj skribado; post tagmanĝo, kiu lin vidus, dirus ke li estas ia metiisto: li boras, aŭ lignon eltranĉas aŭ laboras per tornilo kaj lia barbo estas ofte plena de rabotaĵo, ke eĉ li mem ridas pri si. Kaj ŝvitas, kvazaŭ li povus manĝi sian panon nur per sia laboro. Ĉiu miras pri li kaj li priridas tiun, kiu plendas pro enuiĝo ... Lia filo ne estus povinta agi simile, bone li faris, ke foriris ...

CXII.

Rodoŝto, 8. April. 1735.

Kion time ni antaŭvidis, tio jam okazis. Dio igis nin orfoj kaj levis el inter ni nian amatan sinjoron kaj patron post la tria matene. Estante hodiaŭ Sankta Vendredo, ni devas priplori la morton kaj de nia ĉiela kaj de nia tera patroj. Dio prokrastis la morton de nia sinjoro al hodiaŭ, por sanktigi la oferon de lia morto per la merito de tiu, kiu hodiaŭ mortis por ni ...

... Ŝajnas al mi, ke mian lastan leteron mi skribis la 25-an de la pa-

oni tamburas je duono antaŭ la sepa. La vespermanĝo daŭras nelonge, je la oka la princo senvestiĝas, sed tiam plej ofte ankoraŭ ne enlitiĝas. Kaj matene, kvankam li vestas sin nur je la sesa, li ellitiĝas jam je la dua post noktomezo. Ne pensu, ke en ĉio ĉi okazas eĉ la plej malgranda ŝanĝo. Eĉ se la princo estas malsana, ankaŭ tiam sammaniere okazas la doma ordo. Ellitiĝi je la kvina kaj duono ne estas bagatela, tamen mi neniam preterlasas tion, por esti je lia plaĉo kaj mi ĉiam ĉeestas, kiam li vestas sin, ja mia ofico inkluzivas ankaŭ atenti pri la servistoj ... Koncerne la amuzadon kaj la tempo-pasigadon, ili estas multespecaj, kaj ĉiu sekvas sian inklinon. La princo sidiĝas sur ĉevalon du fojojn en semajno kaj ĝisvespere ni ĉasas, ĉar ĉie tie troviĝas multe da perdrikoj kaj leporoj, — ruĝaj perdrikoj pli multe ol grizaj. Kiam la princo ne iras ĉasi, tiam li pasigas la tempon nur per skribado ...

LXXXVIII.

Rodoŝto, 24. Martii 1728.

Kara fratino, hieraŭ iom da ploro kaj fluo de larmoj estis ĉi tie. Tio okazis, ĉar duko György (la pli juna filo de la princo, kiu vizitis lin kaj

Seĝo de Rákóczi, farita de li mem





La sarkofago de Rákóczi en la katedralo de Kassa (Košice)

sinta monato. Ekde tiam la povra sentis ĉiam grandan malviglecon. Tre malmulte li agis, sed cetere ĉion li faris laŭ la ĉiutaga kutimo. Eĉ en tiu malforta stato li laboradis per la tornilo ĝis la unua de aprilo. Tiun tagon la malvarmo forte tuŝis lin, kio igis lin ankoraŭ pli malforta. Sekvintan tagon li fartis iom pli bone. Palmodimanĉon pro malforteco li ne povis iri al la preĝejo, nur el proksima domo li aŭskultis la meson. — Post la meso la pastro portis al li la sanktizitan branĉon, li genuanta transprenis ĝin el lia mano, dirante, ke eble plian fojon li jam ne ricevos branĉon. Lunde lia farto fariĝis iom pli bona, — marde same — eĉ tabakon li ekdeziris kaj fumis. Kaj ni ĉiuj miris, ke ĝis la horo de sia morto nenion li preterlasis en la doma ordo, nek permesis, ke iu ajn ion preterlasu.

Ĉiun tagon li vestis sin en la kutima horo, tagmanĝis kaj ekkuŝis. Kvankam apenaŭ li tenis sin, li vivis laŭ la ordo, kiel li faris, kiam estis sana. Merkredon posttagmeze li iĝis tre malforta kaj ĉiam dormis. Kelkfoje mi demandis lin, kiel li fartas? Li respondis nur: „Mi fartas bone, sentas nenian doloron." Ĵaŭde, estante tre proksime al sia fino, li tre malfortiĝis kaj komuniis kun granda pieco. Vespere, kiam venis la tempo por enlitiĝi, oni tenis lin duflanke ĉe la brakoj, sed li iris mem al la dormejo. Oni jam malfacile komprenis lian parolon. Je la dekdua nokte ni ĉiuj estis apud li. La pastro demandis, ĉu li volas akcepti la lastan sanktoleadon. Li kapsignis, ke volas. Fininte ĝin la pastro diris al li belajn admonojn kaj konsolojn, sed li jam ne povis respondi, kvankam ni vidis, ke li havas la konsiencon kaj ni vidis ankaŭ, ke ĉe la admonoj li larmis. Fine, post la tria hodiaŭ matene, doninte sian animon al Dio li ekdormis — ĉar tiel li mortis, kiel infano. Senĉese ni rigardis lin, tamen nur tiam ni rimarkis, ke li forpasis, kiam liaj okuloj malfermiĝis. Li, la povra, lasis nin orfaj sur tiu fremda tero. Nun estas terura plorado inter ni. Dio konsolu nin.

CXV.

Rodoŝto, 18. Juli 1735.

La kortego permesis, ke sekrete ni portu la korpon de nia kompatinda sinjoro al Konstantinopolo. Mi farigis grandan keston, fermigis en ĝi la ĉerkon kaj igis meti ĝin sur ŝipon. Kun kelkaj akompanantoj la 4-an ni ekveturis kaj alveninte la 6-an en Konstantinopolon mi sendis la keston, en kiu troviĝis la ĉerko, al la Jezuitoj. Tie oni elkestigis la ĉerkon kaj malfermis ĝin por vidi la korpon. Tombon ili fosis tie, kie estis entombigita la patrino de nia sinjoro. Oni trovis jam nur ties kapon, fermis ĝin en la ĉerkon de la filo kaj kune entombigis ilin ...

CXVII.

Rodoŝto, 8. Octob. 1735.

... Nun venis al mi la penso, ke mi devus sendi al vi adiaŭan leteron de mia sinjoro, skribitan al la veziro. Neniam la turka kortego havis tian konfidon al kristana princo, kian al li, la povra. Liajn konsilojn oni tie aprecis kaj sekvis. Kredu fratino, vere li povis doni bonajn konsilojn.

La kopio de la adiaŭa letero de nia sinjoro, skribita al paŝao Ali, la veziro de la Luma Kortego:

Veziro, brilanta en la unua posteno de la glora imperio, ornamita per granda saĝo, mia kara elkora amiko, kiun Dio benu per ĉiopovaj bonoj!

Sendube miros la veziro, mia kara amiko, kiam li ricevos tiun ĉi mian leteron kun sciigo pri mia morto. Sed ĉar la mortonteco de la homa naturo montris al mi mian morton jam neevitebla, mia amo al Dio admonis min prepari min por iri al li, kaj mia dankemo kontraŭ la nevenkebla sultano instigis min, ke sen adiaŭi al li mi ne foriru el tiu ĉi mondo. Konsiderinte tion mi eldonis instrukcion ankoraŭ en mia sana stato, ordonante al miaj ĉefoficiroj, ke kiam ili anoncos mian morton al la veziro, ili alsendu tiun ĉi leteron al mia amiko. Instigu do lian koron la lastaj vortoj de lia vera amiko, kaj li prezentu al la sultano, al mia majesta moŝto, la lastan parolon de mia koro plena de dankemo... La ĉiopova Dio rekompencu lin per siaj plej karaj benoj pro la bonfaroj, kiujn li faris al mi kaj en la nomo de tiu Dio mi petas lin, permesu li, ke miaj malmultenombraj fideluloj, similaj al ŝafoj lasitaj sen pastoro, plenuminte mian skriban testamenton — metinte mian korpon por ripozo apud mian patrinon sen ajna monda pompo — neĝenite kaj sentime povu iri sian vojon kondukantan al aliaj landoj, aŭ al kiu plaĉos, povu resti en la imperio. Post ĉio ĉi dezirante de Dio korpan kaj animan benojn al la veziro kaj al la tuta imperio, finas siajn vortojn lia fidela amiko, nun jam fariĝinta polvo kaj cindro, F. R.

CCVII.

Rodoŝto, 20. Dec. 1758.

Kara fratino! ne nur ni, sed la tuta homaro estas kiel mortkondamnitaj malliberuloj, kiuj ne scias, kiam oni portos ilin al la morto. Nia sorto estas same tia. Kiom da sinjoroj, nobelaj homoj ni jam entombigis en jena aŭ alia jaro! Tiom multain, ke ni jam restis du kune kun sinjoro Zaj. Dio ankaŭ lin prenis el la ekzilo la 22-an de oktobro. Nun mi jam restis sola el la ekziliĝintoj kaj mi jam ne povas diri, kiel ĝis nun, ke prefere oni elportu tiun aŭ tiun pli antaŭe ol min, ĉar restinte sola, mi mem devos iri al la ofero. Post la morto de sinjoro Csáky la kortego nomumis sinjoron Zaj ĉefo de la hungaroj, kiuj troviĝas en tiu ĉi lando sub la protektado de la sultano. Post lia morto mi devis iri al la kortego por raporti pri lia morto. Laŭ la kutimo oni faris min „baŝbugo" (ĉefo). Ĉar estas notinde, ke kiuj venis kune kun la maliuna Rákóczi, el tiuj restis nur mi. Kaj tiuj, kiuj estas nun kun mi, estas ĉiuj novaj...

... Kiam mi skribis al vi, fratino, mian unuan leteron, mi estis dudeksep-jara, kaj tiun ĉi mi skribas en mia sesdeknaŭa. El tiu lasta mi dekalkulas 17 jarojn, la ceterajn mi pasigis en senutila ekziliĝo. Ke senutila, tion mi estus devinta ne diri, ĉar en la decidoj de Dio nenio estas senutila. Ĉar li ordonas ĉion por sia propra gloro. Ni devas do atenti, ke ankaŭ ni utiligu ilin al lia gloro. Tiamaniere ĉiu lia decido pri ni estos por nia savo. Ni ne deziru do alion ol la volon de Dio. Ni petu de li gracoplenan vivon, bonan morton kaj la saviĝon. Post tiu lasta ni jam liberiĝos de la pekoj, de ĉiuj pekoj, de la ekziliĝo kaj de la nekontentigeblaj deziroj. Amen.

Trad.: Tibor *Ujlaky-Nagy*

Tibor Barabás

Multaj estas la kurucoj

La historio komenciĝas tiam, kiam en 1951 la direktoro de Urbocentra Teatro komisiis min pri verkado de unuakta historia dramo. Li intencis surscenigi kune tri unuaktaĵojn: la „Torĉoflamo"-n de *Illyés* en unuakta formo, la verkon de Géza *Gárdonyi* kaj la mian. Sub tia komisio, la verkisto esploradas konscience kaj fervore la kaoson de memoroj kaj fantazio, ĝis kiam li trovas la temon. Mi elektis la kurucojn. Tiun momenton, kiam Ferenc *Rákóczi*, ekzilito en Pollando, iama „loĝanto" en *Wienerneustadt*-a prizono, fuĝas de la ekzekutista hakilo. Rákóczi alvenas al *Klimecz*, al la hungara landlimo, por renkonti tie en domo de pola arbaristo la francan deputiton, grafon *Bercsényi* kaj la malriĉulojn de Tamás *Esze* el *Tarpa*. La temo entuziasmigis min, la drama konflikto estis tiel bona kiel ĉiuj sojloj, kiujn trapasinte oni pligrandiĝas... La restintaj el la batalperdo ĉe *Dolha*, la nova franca delegito, la atencanto kaŝdungita far la aŭstroj, ĉiuj volas haltigi Rákóczi-n, sed li, pelate de vera kompato kaj amo por la patrio, transpasas la landlimon, venkas la antaŭjuĝojn restintajn post la edukado, kaj fariĝas tiu, kiun la dekjara batalo kaj la eterna fideleco faris el li: persono inda je entuziasmo de l'popolo. Kvazaŭ dudek figuroj ĉirkaŭas la heroon en la vojkruciĝo de Klimecz, impedante aŭ pušante lin kontraŭ la celo.

Ĉar komencanto en dramverkado, mi estis ege kontenta per mia dramo, prozverkistoj facile konfuzas la belan dikcion kaj la agadon pulsantan pro drameca forto. Dum du monatoj mi laboris per la unuaktaĵo. Trairante la pordon de Urbocentra Teatro, kontente pro la finita laboro, mi eksciis ke la direktoro laborinta tie ekde duonjaro jam estis translokita, kaj la nova direktoro eĉ aŭdi ne volis plu pri unuaktaĵoj. La Literatura Fondumo ekprotektis min, nenia financa malprofito difektis min, tamen — kvankam nur tre mallaŭte mi kuraĝas diri tion — oni verkas ne nur por profito. Miaj kurucoj kvazaŭ nenaskitaj fetoj postulis vivon, volis liberiĝi el la papera malliberejo de l'fantazio — unuvorte, ili volis iri en la scenon. Mia unua penso estis: la unuaktaĵo devas aperi, ĉar tiam evidentiĝos ĝia scenbezona karaktero, kaj ankaŭ aliuloj rekonos ĝiajn internajn valorojn konjektitajn nur pere de mi. Tiutempe estis aperonta antologio propagandanta la principojn de l'popola armeo, mi sendis do mian verkon al la eldonisto. Iun lundon la redaktoro le l'antologio sciigis min, ke ĝi ne atingas la nivelon. Merkrede mi legis en la gazetoj, ke la „Displektitaj flagoj" gajnis la duan premion en la armea konkurso, poste mi eĉ ricevis la premion kaj aldone la rekonon de ĉefkolonelo. Sed eĉ nun ne temis pri la surscenigo de l'dramo. Okaze de la enketo ekaperis denove mia eta dramo. Verkisto-kolego en sia alparolo demandis, kial ne estas ankoraŭ eldonita kaj surscenigita tiu „elstara" unuaktaĵo. La reagoj ne forestis. Sekvonttage oni telefonis al mi el la lektorato de Popolarta Instituto petante, ke mi alsendu mian verkon por la biblioteko de scenartistoj. Mi sendis ĝin. Tuj venis la respondo: la unuaktaĵo estas bona kaj bela, ili eldonos ĝin, sed ni konsideru la provincajn teatrojn. Multaj estas la kurucoj en la verko. Ke mi kuntiru ok kurucojn, ili restu nur deksesope. Neniam mi faris similaĵon, sed la popolkulturo ne toleras la aristokratismon, ĝi juste prezentas al ni similajn pretendojn. Post longa interna batalo kun mi mem, mi surbušigis al Jakab *Bige* alies vortojn, kaj tiel plu... Duonjaro pasis. La unuaktaĵo ne aperis. Pro mia interesiĝo, la direktoro alvokis min. Kial mi faris tion, kial mi kuntiris la rolojn, kial mi difektis — mi citas liajn vortojn — la „klasikan" verkon. Mi respondis per anekdoto temanta pri rabistoj kaj pri arbara knabineto senhavigita de sia ĉasteco, sed la unuaktaĵo eĉ tiam ne aperis.

Iun tagon la tiama dramaturgo de Vilaĝteatro interesiĝis pri la „Displektitaj flagoj". Li legis ĝin. Pro modesteco, neniun el liaj superlativoj mi sciigas. Mi sentis min Ferenc *Molnár*, vestita en hungara festuniformo. Post kelkaj tagoj li telefonis al mi. La dramo plaĉas al ĉiu. Estas nur unu malagrablaĵo. Multaj estas la kurucoj. En la aŭtobuso estas loko maksimume por dekkvar personoj — tiucele —, do mi sendu ses kurucojn en la transmondon. Plejplene furiozis ankoraŭ en mia interno la spirita batalo inter la verkisto, kiu volas vidi la realigon de sia laboro kaj la memdifektanto, kiam oni avertis min telefone, ke plus du kurucoj devas esti forigataj, ĉar ankaŭ la dekoraciestro kaj la lumigisto volas veturi kune kun Tamás Esze kaj Rákóczi. Finigis mian spiritan turmenton tre rekonema direktora letero, en kiu, krom la pritaksado de mia literaturhistoria valoro, la teatro informis min pri sia abnegacio pro la granda nombro de kurucoj.

Tiam koncipiĝis en mi landproporcia venĝo: mi verkos filmon pri la kurucoj, en kiu ne dudek, sed mil kurucoj dispecigos la *labancojn*. Ĉu multaj estas la kurucoj? Tiam vi ekvidos, kiom ili multobliĝos!

Frigyes *Bán* surfilmigis la „Leŭtenanto de Rákóczi" en la altebenaĵo de montaro *Bükk*. Mi ĵetiĝadis ĉe la landvojo de *Hámor*, inter kestegoj kaj reflektoroj de granda kamiono. Mi tutkore deziris ekvidi la fantazian batalon ĉe rivero *Vág*, la kavalerion kuratakantan per displektitaj flagoj, la bravajn artilerianojn, la kuraĝajn infanterianojn.

La vojfino abrupte vidiĝis, kaj en la arbarkronita valo mi ekvidis la grizetkolorajn flagojn de Bottyán *Vak*. El la kanonfumoj disvolviĝis la kuratako de kuruca kavalerio, la blank-kamizolaj labancoj freneze fuĝis. Mi konfesas, ke miaj okuloj pleniĝis de larmoj. Kaj tiam subite ekparolis megafono: „Ni finas!... Enviciĝu!... Kamaradoj labancoj dekstren, germanaj soldatkamaradoj mezen, kamaradoj kurucoj maldekstren... Transdonu la vestaĵojn, la pafilojn, la kartoĉujojn..." Mi kuregis al Frigyes Bán, kiu staradis ĉagrenite meze de la filmig-grupo. — Kio okazis, *Frici*? — mi demandis lin. La mansvingis. — Iu ordono... Multaj estas la kurucoj, sescent el ili estis „forkomanditaj kune kun la ĉevaloj". Mi rapidflugis al *Pešto* per aviadilo. Por ĉiu kuruco mi aparte petegis. Finfine venkis la saĝo kaj la bonvolo, la soldatoj plurestis en Bükk kaj finbatalis la batalon ĉe rivero *Vág*...

La gazetoj aperigis rekonajn resumojn pri la filmo; nur tiu persono, laŭ kiu en la teatra sceno la kurucoj estis tro multaj, unusence riproĉis, ke cele de la grandioza efekto povus esti pli multaj kurucoj en la totalaj bildoj...

Tr.: Zsuzsa *Varga-Haszonits*

La monumento de Rákóczi antaŭ la parlamento

panoramo

La Hungara Etnografia Societo aperigas nacian etnografian eldonaĵon en 16 volumoj. Nuntempe aperis la unuaj kvar volumoj en germana, sudslava, slovaka kaj rumana lingvoj. Laŭ la deklaro de prezidanto de Societo d-ro Iván *Balassa*, la kvar volumoj enhavas 737 paĝojn, plurcent desegnojn, mapojn, fotojn kaj notojn. Pri la redaktado de pluaj volumoj okupiĝas multaj verkistoj, folkloristoj, etnografoj, kaj popoledukistoj. Ĉiujare aperos kvar volumoj.

*

„Liberecbatalo de Rákóczi kaj Eŭropo" — sub tiu titolo estis aranĝita internacia scienca konferenco fine de majo en la historia fortikaĵo de Sárospatak.

Krom hungaraj historiistoj partoprenis la konferencon fakuloj de dekunu landoj. En la malferma parolo universitata profesoro István Sinkovics donis skizon pri la epoko de Rákóczi, skizis la motivojn, pro kiuj Rákóczi decidis akcepti la batalon estrante kamparanan armeon; li taksis liajn organizajn agadojn kaj eksterlandajn politikajn rilatojn.

Béla Köpeczi, akademiano, en sia prelego analizis la evoluon de Eŭropo en la XVII—XVIII-a jarcentoj, postreston de Meza-kaj Orient-Eŭropo; konatigis la internan staton de la tiama Hungario, poste ĝian rilaton al la ĝenerala Eŭropa situacio, la politikon kaj batalon de Rákóczi.

Ĉeĥoslovakaj, polaj, sovetaj kaj turkaj historiistoj kompletigis la prelegon konatigante rezultojn de siaj ĉi-rilataj esploroj.

Okaze de la konferenco estis malfermitaj ankaŭ ekspozicioj en la fortikaĵa Rákóczi Muzeo: pri historio de familio de Rákóczi, kaj belarta ekspozicio sub titolo: „Rákóczi en la arto".

*

En Vieno en la Aŭstra Scienca Akademio oni disdonis la ĉijaran Herder-premion. La Hamburgan fonduson tiuj personoj ricevas, kiuj kun elstara aktiveco kontribuis al la flegado de Eŭropa kulturo. Ĉi-jare krom la bulgara, greka, jugoslava, pola kaj rumana personecoj oni aljuĝis la Herder-premion ankaŭ al la hungara verkisto kaj literaturhistoriisto d-ro Dezső *Keresztury*, kiu estas koresponda membro de Hungara Scienca Akademio. Keresztury multflanke kaj bonrezulte helpis la ekkonon de la germanlingva literaturo. Krom la Herder-premio, disĉiplo aŭ kunlaboranto de la honorigita persono ricevas unujaran stipendion de Hamburga-fonduso. De hungara flanko la stipendion ricevis András *Vitai*. En la solena aranĝaĵo partoprenis ankaŭ la Viena hungara ambasadoro d-ro Lajos *Nagy*.

*

Ni jam raportis en la n-ro 1976/3 de HV, ke en la urbo Szombathely la vidvino de fama hungara pentristo, István Dési Huber donacis al la urbo plurcent pentraĵojn, grafikojn de sia edzo. Antaŭ tiu evento la vidvino de alia fama hungara pentristo, Gyula Derkovits donacis al la muzeo pentraĵojn, kiuj poste riĉiĝis per novaj donaĵoj. La loĝantaro de urbo Szombathely decidis, ke oni devas konstrui grandan galerion por la grandvalora nacia trezoro. Fondiĝis bildarej-konstruada societo, en kiu partoprenas la laboristoj kaj salajruloj de fabrikoj kaj institucioj de la urbo kaj la departemento Vas. Finance kaj kun memvola laboro ankaŭ helpas la societon la Kultura Ministerio, la Belartaj Federacioj kaj la Arkitekt-arta Federacio.

Dum la monato junio mortis en Svisio la 55-jara hungara fortepianisto Géza Anda. Kvankam la mondfama artisto ekde 1942 vivis en Zürich, li ĉiam konfesis sin esti hungaro. Li lernis en la Budapeŝta Muzika Akademio „Liszt Ferenc". Li estis la disĉiplo de Imre Stefaniai kaj Ernő Dohnányi. En la Akademio li estis „mirinfano", sed sen ĉiu pozo kaj eksteraĵa brilo. Admirinde egalanima, perfekta tekniko karakterizis lian ludon, kiam ajn li sidis ĉe la fortepiano. Géza Anda kun samforma perfekteco eksonigis la muzikon de Beethoven, Brahms, Schumann aŭ Bartók. Dum la pasintaj jaroj, li ofte donis koncerton ankaŭ en Hungario.

La katedralo de Kassa (kie estas la tombejo de Rákóczi)

panoramo

En la urbo *Sopron* en 1968 oni malkovris la ruinojn de la juda sinagogo el la XIII-a jarcento. La arkeologoj kaj muzeologoj konstatis, ke tiu sinagogo estas unika en Mezeŭropo, ĉar oni sukcesis ĝin malkovri en originala kompleteco. Tiun historian monumenton similas nur la sinagogo en la ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio, en Praha. La Landa Artobjekta Intendantejo direktis la laboron kaj en la tuta beleco sukcesis restarigi la dependajn konstruaĵojn, la ornamitan vestiblon, la banejon kaj la hospitalon. La altvalora artobjekto jam estas tute preta, kaj en la sinagogo oni malfermis konstantan ekspozicion, kiu prezentas la mezepokan vivmaniĉeron de la judismo, donas klarigon pri la rolo de la sinagogo en la mezepoka socio, konkretigas la tiamajn judajn religiajn ceremoniojn.

*

Pri la libereco de kreanta laboro kaj pri la demokratismo le la nuna hungara kulturo okazis t.n. „rondtabla" interparolo en Parizo, en la Hungara Instituto. De hungara flanko parolis la ĵurnalisto Iván Boldizsár, prezidanto de hungara Pen-Club. En la parolado partoprenis, inter aliaj, la francaj Alfred Kastler Nobel-premiita fizikisto kaj Georges-Emmanuel Clancier verkisto, multaj universitataj profesoroj kaj kelkaj reprezentantoj de francaj ĵurnaloj kaj gazetoj.

*

La gazetoj *Mainiĉi Ŝinbum* kaj la japana Times en okulfrapa loko komunikis, ke dum du monatoj gastrolas la infanĥoro de Hungara Radio kaj Televido en Japanio. Ambaŭ gazetoj menciis, ke la hungara infanĥoro jam plurfoje rolis en Japanio kun granda sukceso kaj tio atestas, ke la metodo de Kodály-muzikinstruado estas ĉiam bonrezulta. La hungara ĥoro ĝis aŭtuno 41-fojojn koncertas en Tokio kaj en aliaj urboj.

*

Dum la monato julio okazis en urbo Debrecen la VII-a Internacia Ĥorkonkurso „Bartók Béla", kien el tri kontinentoj — Eŭropo, Azio kaj Ameriko — venis 32 ĥorensembloj kun preskaŭ 3000 partoprenintoj, kiuj ĉefe prezentis kreaĵojn el la XX-a jarcento. En la malferma koncerto honore al la memoro de Bartók oni prezentis de li la faman kreaĵon: Cantata Profana.

*

Kun la titolo: „Akvon kirlas printempa vento..." la centra komitato de CSEMADOK (Kultura Centro le Hungaraj Laboristoj en Ĉeĥoslovakio) jam la kvinan fojon aranĝis la landan popolkantan konkurson por tiuj hungarnacianoj, kiuj vivas en Ĉeĥoslovakio. La decida finalo okazis en la urbo *Érsekújvár (Nové Zámky).*

*

Jam 100-jara estas la „Magyar Nyelvőr" (Hungara Lingvo-gardanto). Tiu revuo estas la lingvistika bulteno de Hungara Scienca Akademio. En gazetara deklaro la responda redaktoro, prof. Lajos Lőrincze taksis la signifon de l'datreveno, konigis la kronikon de hungara lingvouzado kaj faris lingvistikan komparon pri la lingvoreformo. La celo de la monata revuo estas senŝanĝe la disvastigo de hungarlingva kulturo. Okaze de l'datreveno, en la revuo la ĉefartikolon skribis la verkisto Gyula Illyés, prezidanto de hungalingva komitato de Hungara Scienca Akademio.

*

Ĉi-jare en Francio en la Cannes-a Filmfestivalo la premion de la plej bona virina rolformado ricevis dividita la hungara aktorino Mari Törőcsik kaj la franca aktorino Dominique Sanda.



La Rákóczi-Muzeo en Rodoŝto (Tekirdag)

En la organizado de la Instituto de Kulturrilatoj en Turkio oni rememoris pri la 300-a naskiĝ-datreveno de Ferenc *Rákóczi la Dua.* En la Istambula Universitato okazis scienca kunsido, kiun partoprenis — krom la hungaroj kaj turkoj — polaj, rumanaj, bulgaraj kaj francaj scienculoj. En la Istambula Arta Akademio oni malfermis ekspozicion por la memoro de regnestro Rákóczi. La hungara delegitaro lokigis florkronon en la Istambula kapelo *Saint Benoit* — kie antaŭ transporto en la hejmolandon ripozis la restaĵoj de Rákóczi —, kaj florkronon sur la memortabulon de domo Rákóczi en la urbo *Tekirdag* (Rodoŝto).

Tr. Szilárd *Bálint*

La manĝoĉambro de Rákóczi-domo en Rodoŝto

Festparolas H. Tonkin

RENDEVUO EN GREKLANDO

En 1976 gastigis la reprezentantojn de la tutmonda esperantistaro du grekaj urboj: Tesaloniko kaj Ateno. TEJO okazigis sian Internacian Junularan Konferencon en la nordgreka havenurbo; UEA kongresis en la riĉtradicia Ateno.

La 31-a IJK estis rekorda laŭ la nombro de partoprenantoj (krom la 21-a IJK en Pécs, kiu verŝajne ankoraŭ longe havos la unuan lokon): 350 gejunuloj kunvenis el ĉ. tridek landoj, kaj dank' al la favoraj loĝigaj cirkonstancoj ili fartis videble tute bone. La Komitato de TEJO havis *maratone* longajn kunsidojn (ĉu pro la spirito de la loko?), kaj elektis novan estraron, en kiu la prezidanto (Claude S. Nourmont) kaj la ĝenerala sekretario (Bruĉjo Kasini) restis la malnovaj. Estas agrable por hungaroj, ke la prezidanto de Hungara Esperanto-Junularo, Tibor Vaskó elektiĝis vicprezidanto de TEJO. En Tesaloniko la tuto impresis bone (krom la magraj kaj malvariaj vesperaj menuoj, per kiuj Savas Tsiturides, prezidanto de LKK — civile psikiatro — eble celis fari iujn psikologiajn esplorojn en internacia medio), sed reveninte al IJK post dekjara foresto el la junulara movado, mi trovis la TEJO-anojn iom sen-elanaj.

Male al IJK, la Universala Kongreso en *Ateno* estis relative malgranda, ĉeestis iom pli ol mil personoj, tamen tio favore influis la kvaliton: forestis la komencantoj kaj la obstinaj „krokodiloj". Ankaŭ la komitato de UFA havis dece longajn kunsidojn, verŝajne ne tiel okulglue enuajn, kia estis la unua Ĝenerala Kunveno. La dua Kunveno, kiu pritraktis la temon *Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo* jam estis pli vigla, same la surpodia diskutado: *Kiel nuntempe argumenti por Esperanto?* La fakaj kunsidoj multe variis laŭ kvalito, kiel — bedaŭrinde — ankaŭ la komuninteresaj kulturaj aranĝoj.

La *Greka Vespero* donis al la kongresanoj ĝuste tion, kion ili atendis: temperamentajn dancojn kaj muzikon kun buntaj kostumoj. La Bulgara Esperanto-Teatro prezentis la Molieran komedion *Lernejo de virinoj* (sed, kial *bulgaraj* aktoroj ludas dum *Esperanto*-kongreso en *Grekio* — *francan* teatrajon?). La prezentado havis profesian nivelon, tamen mankis el ĝi vigliga spico. Dum la *Internacia Arta Vespero* la plej interesa fenomeno estis „gesinjoro" Auld, kiu anoncis la plejparte neanoncindajn programerojn en tre sprita maniero kaj... vestita en skota jupo. Mi sentis fortan admiron pri la kuraĝo kaj memfido de kelkaj rolintoj... Inter la ceteraj kulturajoj havis atentindan sukceson kvizo pri la Esperanta literaturo kaj movado.

El inter la prelegoj de la *Internacia Somera Universitato* elstaris la lingvistika prelegserio de John Wells, la prelego de Auld *Lingvo kaj kulturo,* tiu de Ragnarsson pri la Islanda literaturo. Sed ne ĉiuj prelegoj havis universitatan nivelon...

La 61-a UK do povas klasiĝi kiel sukcesa kongreso, se oni observas la *internajojn* (krom eble kelkaj organizaj fuŝoj de LKK). Sed ...malgraŭ provadoj mi ne sukcesis renkonti atenanon surstrate, kiu sciis pri la Esperanto-kongreso, nek Esperantajn flagojn krom en la ĉirkaŭaĵo de la kongresejo. Mi havas fortajn dubojn, ĉu oni utiligis la propagandajn eblecojn de UK por la landa movado. Verŝajne, tio ŝuldiĝas al la malforteco de la greka movado. Certe, Universalaj Kongresoj celas ankaŭ fortikigi malfortajn landajn movadojn, tamen tia efiko bezonas minimuman bazon, ekzistantan jam antaŭ la kongreso. Kaj oni ne forgesu: UK sen adekvata propaganda efiko al la ekstera mondo estas nura turisma aranĝo en la vico de mil kaj mil similaj kunvenoj...

V. *Benczik*

REZULTOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ 1976

Por la literaturaj branĉoj — ĉiuj originalaj — alvenis entute 61 konkursajoj de 21 aŭtoroj el 14 landoj.

Poezio:

1. Edward *Tvarozek* (Ĉeĥoslovakio): „Sola en sunsubiro".

2. Albert *Goodheir* (Skotlando): „Printempaj strofoj", kaj Vesna *Skaljer-Race* (Jugoslavio): „La manoj de l' homo".

3. Vesna *Skaljer-Race* (Jugoslavio): „Turniĝas la rado de l' historio".

Prozo:

1. Endre *Tóth* (Hungario): „Lappar, la Antikristo".

2. Endre *Tóth* (Hungario): „La murdita juglandarbo".

3. Karol *Piĉ* (Ĉeĥoslovakio): „Ne lasu min ĉi tie, patro!"

Dramo:

1—2. ne aljuĝitaj.

3. Alexander R. *Mollison* (Skotlando): „Kongres-hotelo".

Nova Talento:

Bernard *Golden* (Hungario): „Tropika festeno" (prozajo).

FOTOKONKURSO

Por tiu ĉi konkurso alvenis 46 fotoj de 13 personoj.

1. Zoltán *Fejér* (Hungario): „Kálmán Kalocsay".



Ĉe la giĉeto

2. Bernard *Golden* (Hungario): „Daniel kaj la leonoj".

3. Leila *Kantonel* (Finnlando): (Forto sen titolo).

Laŭda Mencio: Zoltán *Fejér* (Hungario): „Infanoj".

„*PREMIO MINNAJA*" (Por originalaj eseoj)

Karol *Piĉ* (Ĉehoslovakio): „La interna sistemo de Esperanto".

La greka teatra vespero



iktor Vasarely inter siaj bildoj

VASARELY — FONDUSO

por la beligo de la modernaj urboj

Aix-en-Provence, suda urbo de Francio estis la scenejo de interesa evento dum la komenco de ĉi tiu jaro. En la ĉeesto de la ĉefministro *Chirac* oni inaŭguris la novan konstruaĵon de la *Vasarely-fonduso.* La celo de la grandega, moderna konstruaĵo, kiun ornamas la kreitaĵoj de la hungardevena fame konata artisto, estas: krei esplor-kaj eksperiment-metiejon por tiuj artistoj, kiuj strebas beligi kaj fari harmonia la loĝkonstruaĵojn kaj per tio la urboaspekton.

— Ankaŭ la moderna urbo povas esti bela kaj harmonia, en kiu oni povas vivi agrable — asertas Vasarely. — La fondinto celas venki la



Aguia, 1955

Zebro, 1938, tekstaĵo



vidaĵajn malutilojn, peligi la artefaritan ĉirkaŭaĵon kaj efektivigi la feliĉon de la „kolora urbo". Nia plej grava celo estas direkti la humanisman evoluon de la urboj, por ke ankaŭ la loĝdomoj kaj urbopartoj, kiuj konstruiĝas el pli modestaj materialoj, ĥavu ne nur la rolon de la loĝejo, sed ankaŭ tiun de hejmo kaj ĉirkaŭaĵo. Ni klopodas elformi la stilon de nia erao, konforme al la nova vivomaniero. Ni volas kontentigi tiun gravan animan bezonon de la homaro, ke ĝi ektrovu la plezuron de la vidado — diris la artisto.

En Budapeŝto oni aranĝis ekspozicion en 1969 el la artaĵoj de Vasarely. Tiam pritraktis la unuan fojon József *Bondor*, ministro pri konstru-kaj urboevoluigaj aferoj, kun Vasarely pri la apliko de la ideo de „kolora urbo". Tiam leviĝis la penso por forigi la monotonecon de la loĝkvartaloj pere de la ceramikaĵoj de la *Zsolnay*-fabriko en *Pécs*.

La Tutlanda Artobjekta Inspektoraro intertempe restaŭrigis la naskiĝdomon de la artisto en Pécs. Komence de junio d-ro F. *Molnár* kulturafera ŝtatsekretario solene malfermis la Vasarely-muzeon, la plej novan belartan kolektaĵon de la urbo, kies materialon donacis al sia naskiĝurbo Viktoro Vasarely, la kreinto de la Op-Àrt. La kulturafera ŝtatsekretario salutis la artiston, lian edzinon kaj la du filojn. La donacaĵo, kiun la artisto havigis al la urbo, entenas 150 pentraĵojn, grafikaĵojn, tapiŝojn, plastikaĵojn. Krome li aldonis ankaŭ iom da kolektaĵo el la verkaĵoj de sia edzino kaj de siaj samtempuloj, kiu kolektaĵo konsistigis ankaŭ sian propran havaĵon. La ŝtatsekretario aprecis la preskaŭ duonjarcentan belartan agadon de la majstro kaj tiun lian strebadon, ke li faru la arton publika trezoro.

Zebro, 1939—60

En la nomo de la Kulturafera Ministerio li esprimis dankon pro la donacado de la grandvalora kolektaĵo, per kiu la artisto atestis fidelon al sia naskolando. La urbo Pécs kreis indan hejmon por la kreitaĵoj kaj estas certe, ke la demokratmotiva arto de Vasarely trovos multajn ŝatantojn de la belarto.

* * *

Samtempe Vasarely kontraktis kun la urbo Győr, por krei du grandmezurajn mur-pentraĵojn por la tiea teatro.

Tr. István *László*

Vega-Arl, 1968



Cheyt-Pyr, 1970—71



Ervin Lázár[1]

LA LEPORO KIEL INTERPRETISTO

Ĉe la rando de la Senarbejo ridetaĉis rondvizaĝa Kukurbo. Ĝi estis tre talenta en ĉi tiu artspeco. Majeste ĝi povis ridetaĉi. Nu, tamen, tio ne tro gravas. Ĉar en la senarbejo ĝuste la Kapro estis matenmanĝanta. Ankaŭ li ne estas tro grava, sed mi volas rakonti pri li.

Komence de la rakonto, do ĝuste nun, samtempe kun la majstra ridetaĉado de la ne-tro-grava Kukurbo, la Kapro diris:

— Mek-mek.

Nu, se mi scius kaprolingve, tuj ĉi-momente mi dirus, kion tiu mek-mek signifis. Nura hiko[2] *estas ke mi ne scias kapre. Do ĝi povis signifi: „Hej, kiel bona estas ĉi tiu freŝa festuko", sed ankaŭ: „Ĉiam ĉi tiu aĉa festuko! Min enuigas." Sed tio jam neniam malkovriĝos, nur jam eĉ pro tio, ĉar el la arbaro elpaŝis la Ĉevalo, haltis ĉe la rando de la senarbejo kaj tute ne mallaŭte li diris:*

— Nihehen.

La Kapro suprenĵetis la kapon, gapis por iom da tempo la Ĉevalon, kiel bovido la novan pordon. Poste „mi-ne-scias"-forme li disigis la du antaŭkrurojn, signante, ke li ne komprenas eĉ unu etan sonon el tiu „nihehen."

— Mek-mek, — kaj post iom da pripensado li ankoraŭ aldonis: mek.

La Ĉevalo ekmovis la ŝultron, skuis ankaŭ la kapon, kaj diris:

— Nihehen.

Tio povis signifi „mi ne komprenas", sed eventuale ankaŭ „bonan tagon." Mi ne scias. Bedaŭrinde, mi ne scias ĉevalolingve. Estis pli grava malbono, ke ankaŭ la Kapro ne sciis. Ili proksimiĝis unu al la alia.

— Nihehen — klarigadis la Ĉevalo.

— Mek-mek — provadis la Kapro. Li prononcadis tre malrapide, silabante, ke eble la Ĉevalo tiel komprenu.

Sed li ne komprenis.

La Kapro malĝoje skrapis sian verton, kaj la Ĉevalo meditadis, koncentrante sian tutan forton. Pro tio, eĉ pli ol kutime, liaj oreloj disstaris. Poste ekbrilis lia vizaĝo. Li ektrovis, ke li scias iom azenolingve.

I-a, i-a — li diris. Kvankam la prononco ne estis prefekta, tamen kiu scias azene, povas kompreni.

Sed la Kapro eĉ tiun lingvon ne sciis. Tamen, se jam la Ĉevalo uzis fremdan lingvon, ankaŭ li ne volis resti en honto, li ekparolis ŝafolingve, aŭ kiel elite oni diras, ariese[3].

— Beee — li diris.

La Ĉevalo skuis la kapon. Li ne sciis ŝafe.

Jam tiel ŝajnis, ke neniam ili interkompreniĝos. Tiam la Kukurbo ekvidis la Leporon kaj ekkriadis al li. Kukurbolingve. Por tiu tempo li eĉ forlasis la ridetaĉadon.

La Leporo, apartenanta al la plej kleraj animaloj en la arbaro (li sciis ja eĉ kukurbe), sammomente komprenis, pri kio temas, kaj per dignoplenaj paŝoj alproksimiĝis. Plej volonte li estintus kuranta, sed por tia multescia animalo ja ne decas orelule[4] *saltadi.*

— Nu, diru — li diris —, feliĉe mi parolas ĉiujn lingvojn.

Pro ĉi tiu frazo li iom ruĝiĝis, ĉar la vero estas, ke kapreole li nur iom balbutis kaj oriole kaj alaŭde li ne sciis eĉ vorteron.

Tamen li estis deca animaleto; li almenaŭ ruĝiĝis, kiam mensogis.

La Ĉevalo kaj la Kapro tre ekĝojis pro li.

— Nihehen — la Ĉevalo diris.

— Mik-mek? Mik-mek? — demandadis ekscitite la Leporon la Kapro.

— Li diras: mek-mek — interpretis la Leporo. La vizaĝo de la Kapro ekbrilis kaj feliĉe li diris:

— Mek-mek, mek-mek.

— Nihe? Nihe? — demandis nun la Ĉevalo.

La Leporo tradukis:

— La Kapro diras: nihehen — li klarigis al la Ĉevalo.

La Ĉevalo kaj la Kapro interridetis kaj amike ili kuntuŝadis la skapolon unu de le alia. Enuis tion unue la Kapro. Li prenis krur' en kruro la Ĉevalon, ili iradis al la Kukurbo kaj ĝin formanĝis.

„Ĉu mi tradukis ĝuste?" — meditadis la Leporo, kaj zorgoplene faldis sian frunton.

Tr. O. H.

---

1. *Ervin Lázár verkas siajn fabelojn por infanoj. Tamen li estas populara ankaŭ inter la pli aĝa junularo kaj la plenkreskularo, ĉar liaj fabeloj ĉiam havas pli profundan signifon. Kio estas nur interesaĵo por infano, povas esti pensovenka saĝaĵo por pliaĝulo. La supra fabelo aperis en lia hungarlingva libro „La sepkapa feino" (A hétfejű tündér, Móra Könyvkiadó, Budapest, 1973).*
2. *Hiko: malfacilaĵo, malhelpo, (en la planado, logiko).*
3. *Arieso: konstelacio en la boreala hemisfero (= „ŝafo" en astronomio)*
4. *Orelule: kiel longorelulo, do kiel leporo.*

Pri niaj datrevenoj

Aperis la unua numero de *Hungara Vivo* en 1961, do nia revuo estas nun 15-jara, kaj estas 16-jara la hungarlingva organo de Hungara Esperanto Asocio: *Világ és Nyelv* (Mondo kaj Lingvo), kiu daŭrigas la laboron de sia antaŭulo, Hungara Esperantisto jam ekde 3 jaroj kun nova titolo, kun nova enhavo. Ĉu estas ĉi tiuj datrevenoj indaj por diri kelkajn frazojn, aŭ estas pli saĝa taksi ilin, kiel bagate laĵojn?

Kiu konas la turmentan lingvan problemon de nia epoko, kaj jam trovis la eblecon por ĝia solvo: Esperanton, tiu bone scias ankaŭ la gravan rolon de revuoj, gazetoj, forumoj aperigataj regule far landa kaj monda movado. Eble ni povas diri sen malmodesto, ke „*Hungara Vivo*" kaj „*Mondo kaj Lingvo*" en tiu ĉi koncepto klopodas servi nian aferon.

Kvankam la titolo de nia revuo estas Hungara Vivo, la abonantoj, legantoj povas percepti en ĉiu numero, ke ĝi — laŭ sia enhavo kaj tipografio — ne similas al multaj Esperantaj gazetoj, ke Hungara Vivo estas efektive *literatura kaj arta revuo.* Eldonita en Hungario, kompreneble ĝi estas unuavica forumo de hungara literaturo, arto, scienco, de rezultoj, fenomenoj kaj problemoj de hungara popolo, sed ĉi tiu parto de nia laboro ĉu estas nenecesa, neinteresa? Ĉu ne estas tre gravaj elementoj la valoroj de naciaj literaturoj, artoj, sciencoj, ktp. en la specifa internacia kulturtrezoro de Esperanto? Apud la originalaj Esperantaj verkoj, ĉu la naciaj plenumaĵoj ne estas la dua duono de nia komuna kulturo? Se jes, tiam devas esti honorinda por ĉiuj esperantistoj ankaŭ la Hungara Vivo.

Senhezite mi kuraĝas opinii tiel, ĉar apud la menciitaj trajtoj nia revuo publikas la plej multajn originalajn verkojn — eble en tuta Esperantio. Kaj kiel en sekvonta numero vi povas vidi la novan rubrikon: Literatura metiejo — ĝi denove dokumentos nian konsekvencan redaktan praktikon. Ni mem ne fanfaronis, ke Hungara Vivo estas la plej altnivela literatura revuo en Esperantio, kvankam foje-foje ni aperigis ĉi tiun opinion de niaj legantoj, sed ni povas konfesi, ke ankaŭ tiu celo troveblas inter niaj klopodoj.

Post Hungara Vivo estas por ni kara la *Mondo kaj Lingvo.* Kial? Tial, ĉar dum la lastaj tri jaroj ankaŭ ni spertis, ke nia hungarlingva laboro por nia afero estas interesa, eĉ ekscita entrepreno. Aperigi revuon nacilingve pri nia temo estas ankaŭ nun diskuŭata, eble laŭ nia metodo kaj rezulto momente senekzempla en la mondo.

Niaj tri-jaraj spertoj estas:

1. en hodiaŭa periodo de nia movado jam estas rekomendate, urĝe eldoni nacilingvajn revuojn pri la multlingveco kaj ĝia solvo, krei forumojn, kiuj informadas neesperantistojn, simpatiantojn;

2. maturiĝadas la kondiĉoj veršajne en multaj landoj aperigi nacilingvajn organojn, sed oni devas trovi la taŭgajn, realigeblajn rimedojn;

világ és nyelv

1976. 4. szám — A MAGYAR ESZPERANTÓ SZÖVETSÉG FOLYÓIRATA

Realitás — tehát igazság?

Drákói intézkedések a „franglais" ellen

A 26. Magyarországi Eszperantó Kongresszus

Lázár Ervin novellája

Bábel siketnémái

Keresztrejtvény

Ára 4 Ft

A világ nyelvi problémái a parlamentek előtt

VITA STRASBOURGBAN

Az angol nyelvű Európai Parlament Report 1976. március 22. számának beszámolója szerint Tom Normanton, angol parlamenti képviselő, aki tagja az Európai Parlamentnek is, kezdeményező lépéseket tett Strasbourgban az eszperantó erőteljesebb, Hangsúlyozva, milyen sokba kerül az Európai Parlamentnek a tolmácsolás, tervezte 12 millió angol fontban, javasolta az eszperantó nyelv használatát. A Parlament megbízottja, Borschette azt mondotta, hogy ez az ügy nagyon komoly, és fontos, hogy mindenki a saját nyelvén fejezhesse ki magát, Colett Flesh, luxemburgi parlamenti képviselő e megjegyzésre reagálva azt kérdezte, vajon ez a válasz azt jelenti-e valójában, hogy csökkentik a használt nyelvek számát, melyeknek néhány parlamenti képviselő, például a luxemburgiak, nem használhatják Strasbourgban azt a nyelvet, melyet a nemzeti parlamentjükben. Végül Borschette azt közölte, hogy leteszik egy nem hivatalos megegyezés néhány nem fontos nyelv beiktatásának megszüntetéséről.

Kubomben Normanton tagja az *Angol Képviselők Parlamenti Csoportja az Eszperantóért* nevű csoportnak, mely néhány évvel ezelőtt alakult meg, s a legutóbbi választások óta, a korábbi 45-tel szemben most 57 képviselő tagja van. Sok new yorki politikai párthoz tartoznak a parlament két házában.

MUNKACSOPORT NEW YORKBAN

Az év elején kilenc munkacsoport alakult New Yorkban, melynek feladata az Eszperantó Világszövetség érdekeinek, kezdeményezéseinek képviselete az ENSZ-nel. Elnöke Mart Starr, az ENSZ Gazdasági és Szociális Tanácsának munkatársa, titkára Guido Bertucci, aki az ENSZ titkárságán dolgozik, s a munkacsoport tanácsadója Ralph Harry, Ausztrália állandó képviselője az ENSZ-ben, aki hosszú éveken át képviselte hazáját Nyugat-Európa fáblo országában, s ebbeli minőségében is kezdettől aktív híve volt a nemzetközi nyelvnek.

(Cikkünk folytatása a 7. oldalon!)

Új Bábel-tornya New-Yorkban: az ENSz székháza



Titolpaĝo de Mondo kaj Lingvo

3. kelkaj jaroj estis sufiĉaj akceptigi nian temon en la nefaka kadro de publiko, eĉ atingi rezulton ĉe sciencistoj, lingvistoj, (en la redakta komitato de numero 76/4 de Mondo kaj Lingvo ni povis saluti du famajn hungarajn lingvistojn: d-ron János *Balázs* kaj d-ron László *Deme);*

4. nacilingva revuo donis eblecon intervjui rilate nian temon parlamentajn deputitojn, politikistojn, sciencistojn, lingvistojn, verkistojn ktp, kiuj sen tiu organo ne estus dirintaj eĉ unu vorton, kaj rezulte de iliaj alparoloj, artikoloj grado post grado leviĝis, estiĝis vaste diskutebla nia afero, kiel aliaj, seriozaj problemoj de nia socio kaj epoko.

5. do: niaj deziratai celoj dependas de la nivelo (moderna, efika nivelo) de nia movado, de Esperanto-gazetaro.

Por ni, redaktoranoj, hungaraj movad-gvidantoj jam estas hodiaŭ evidente, ke ĉi tiu rimedo: *nacilingva revuo* apartenas al niaj plej modernaj, grandefektaj metodoj. El ĉi tiuj spertoj ni ĉerpis konkludon: se Esperanto-movado volas atingi sian celon, akceptigi nian lingvon kiel internacia lingvo, tiam ni devas batali por nia afero pli saĝe, senpacience, taktike, ol ĝis nun. Oni devas uzi, funkciigi samtempe multajn metodojn, ne nur kelkajn, kaj devas ankoraŭ pli kuraĝe labori kaj komenci novajn kaj novajn iniciatojn, laŭ la troveblaj eblecoj.

Mihály *Gergely*

Attila *Hlavathy*

VIVO STUDENTA

Ploras por dikiĝ' la poŝo magra,
sed sin trovas nur polv' de l' tabak',
pantalono nur de l' triv' malaspra,
sur vest' olda novas nur kravat'.

Kelkcent paĝoj plenaj de scienco
por trastudo dum semajna kur',
sondi, kie kaŝas sin l' esenco,
helpas nur figuroj de la mur'.

Noktomeze vagi sur la stratoj,
onidire sanas la promen'
nepovante dormi pro la kafoj.

En la tagmeziĝa jam maten'
nur vekiĝi de horloĝaj batoj
el la mondsopira sonĝhaven'.

SOBRA SONETO

Sen sento sobre sata,
laŭ lascivema lukto
la viv' tielnomata
per plensatiga nupto

akceptis min volupte.
Sufiĉis nur pretendi,
kaj venis tutabrupte,
ne-pove sin defendi.

Trink' al si mem retenta,
vekiĝa plend' pseŭd-trista,
perina lud' sensenta.

Malantaŭ trompe distra
konduto mempreventa
sin montris mor' filistra.

EN SEKRETA ĜVATO

De supre,
kie la kreda, humila homa pet'
kun nevidebla dia ben' ligiĝas,
eklirlas timida, tenera torent'
por paŭte, psalme penetri
tra kavoj muskofreŝaj.

En fundo de valo,
sub sonĝa vualo
de sin mem ekscita delekta etos',
kun softa balanco
de l' ofta avanco
vi alriveretiĝis.

Ondoj petolaj
per kisoj lascivaj
igis vin al rido san-volupta,
kaj per kaŝa kiso sam-volupta
vi salutis sunon, brizon.

Pensoj pri la kritiko

La artikolo de V. *Benczik* en „Esperanto" (1975/12) estas instiga precipe el unu vidpunkto, nome: ĝi mem dokumentas la feblan staton de la literatura kritiko en E — se ni entute rajtas paroli pri ĝia ekzisto — kiu depost la tempo de *Tárkony* (De paĝo al paĝo) malprogresis al ĝeneralecaj simpligaj konstatoj kaj lingvaj ornamoj.

Pri tio kulpas unuavice la gazetaro. Oni notu, ke ekzemple sur la paĝoj de la iama Nica Literatura Revuo aperis eĉ ne unu priliteratura studo koncerne la IL (Por eviti miskomprenon mi eksludas recenzojn).

Al historia kaj kritika metodoj apenaŭ kontribuis kelkaj lernolibroj, prezentante pli-malpli nuran „katalogon" de aŭtoroj kaj libroj. Nenie la verkintoj de tiuj ĉi helpiloj klopodis difini ekz. la nocion „Esperanto-literaturo", kiu, laŭ Benczik, havas malsaman mision ol tiu de la nacia komunumo. Tamen mankas la motivo — kial kaj kiel? . . .

V. B. pravas, ke laŭkvanta kaj laŭkvalita misproporcioj inter la poezio kaj prozo estas certagrade simptomo de literaturomanio (kion oni povas konstati jam ĉe la frekventintoj de kursoj por komencantoj), sed oni ŝuldas la eksplikon, ke pri la superkresko de poeziaĵoj, plejparte diletantaj, kaj samtempe pri vegetado de la prozverkado, respondecas la redaktoroj, eldonistoj kaj fine, sed ne laste la kritikistoj. Vere, miriga rigardo malfermiĝus al la herbejo de la Esperanta poezio — kiun dum jardekoj etendigis la Esp. gazetaro kaj libromerkato — se ĝi tujsekve estus sarkata.

Aliflanke — jen kiamaniere la kritiko kapablas „apreci" la verkon sen kompleksa konsidero kaj pli preciza interpreto de la fenomenoj ligitaj al ĝi. Dubinda estas tiurilate la starpunkto de V. B. pri L. *Beaucaire*, se la aŭtoro samtempe apriore kaj sen prezenti argumentojn bedaŭras la „doloran malprogreson" de la literaturo.

Sen objektiva kaj science argumentita kritiko oni povas stimuli nek la literaturon nek ĝian disvastiĝon. La legantojn oni ne nur *instigu* konsumi, sed principe *instruu* konsumi. Kompreneble, tiujn ĉi taskojn devas solvi man-en-mane *kvalifikitaj* aŭtoroj, eldonistoj kaj kritikistoj en siaj verkoj kaj studoj same kiel en la ĉiutaga recenzista praktiko.

Oldrich *Knichal*

ĈEVALO

Se iam mi fariĝos riĉa, mi aĉetos ĉevalidon. Mia domo staros sur belega loko. Ne tro granda, sed komforta. De sur la teraso panoramvido al rivero aŭ al lago kaj montoj. Ĉio estos tre bela en tiu domo. Estos ĝardeno, kun altaj arboj, kaŝitaj benkoj.

Tie mi loĝos. Ĉirkaŭ la domo, malantaŭ la ĝardeno, estos paŝtejo. Tie vivos mia ĉevalo.

Mi ne scipovas rajdi, eĉ mi ne volas ellerni tion. Ne volas mi sidaĉi sur dorso de alia vivaĵo. Mi bezonus tiun ĉevalon por fari ĝin libera. Ĉiuj ĉevaloj de miljaroj estis malliberaj, se ili vivis kun homoj. Sur ĉiujn oni sidiĝis, ĉiujn oni enjugis.

La mia denaske vivus libere. Tuttage nur paŝtadus, kuradus kiel ĝi volus. Ĉiumatene mi irus al ĝi, alparolus, karesus. Mi scias: kelkfoje ekkaptus min la deziro, vidante la larĝan, fortan dorson. Tamen mi ne sidiĝus sur ĝin.

Por ke ĝi min povu ami, povu rigardi min brilokule, povu kisi mian sukerhavan manon per la plej molaj lipoj de la mondo . . .

Se ĝi ekvidos matene min, irantan tra la herbaro, ĝi alkuregos, ridante, kun flago de kolhararo.

Ĝi amos min. Ĝi estos mia amiko.

István *Nemere*

La konservado de la pureco de niaj akvoj estas unu el la bazaj taskoj de la medioprotektado

Verkis d-ro Ferenc László

Dua parto

Industriaj poluitaj akvoj

Inter la industriaj polucioj unuaj estas menciendaj la venenigaj materioj. Se venenaj materioj — ciano, diversaj metalsaloj (kupro-, plumbo-, kromo-, stano-, hidrargo-, arzenokombinaĵoj) eniĝas kune kun la aliaj polucioj en la akceptan akvon, malutilas, venenas la animalaron de la akvoj, depende de la koncentriteco, — eĉ povas tiun plene ekstermi. Per tio paralizante la mempurigan kapablon de rivero ili povas malebligi la malkonstruadon de aliaj, malpli danĝeraj organikaj poluciaĵoj. La procezo de mempuriĝo per tio malrapidiĝas, eble tute ĉesas. La akceptanto iĝas morta akvo, eĉ poluad-akvofluo. Pligravigas tiun polucian efikon, ke relative etkvanta poluakvo povas difekti multe pli grandan akvoamason, ekskludante eblecon, de plia utiligo. La tokseco estas karakteriza por la kemiaj kaj maŝinfabrikaj industrioj.

La olea polucio tre perturbas la naturan reguligon de oksigenekonomio. La oleo kune kun la poluakvoj alvenas al la pli malpli grandaj akvofluoj, lagoj kaj tie ĝi superiĝas al la akvosurfaco, formanta kontinuan kvazaŭmembranon. Per tiu ĝi baras la akvon for de la aero, farante malebla ties spiradon, oksigen-transprenon.

La ĉeso de rekompletigo de oksigen-enhavo rezultas oksigenmankon, kion sekvas perturboj supre-menciitaj. La oleoderivaĵoj povas kaŭzi gusto- kaj odor-perturbon de akvo.

Unu el la plej malagrablaj polucioj de la vivaj akvoj estas la gudro kaj fenolo karakterizantaj la poluakvojn de uzinoj prilaborantaj karbon. La gudro sidiĝas sur la fundon de akvokuŝujo, sur la laŭbordajn gruzertavolojn, kaj per tio ĝi malebligas la funkciadon de putoj ĉeborde filtrataj. Ĝia forigo estas tre malfacila kaj multekosta. La guston de fenolo transprenas la viando de fiŝo, kiu iĝas pro tio neĝuebla. En la akvoprovizado de la loĝantaro estas neevitebla la klorizado de akvo, samokaze la fenolo, ĉeestanta en la akvo en tre eta kvanto, demonstrebla nur per etaj spuroj, transformiĝas je tre malagrabla kombinaĵo de odoro intensiva: klorfenolo, pro kio la akvo iĝas netaŭga por trinko.

Poluakvoj acidefikaj estas oftaj. Kvankam la kemia bazefikeco de la akvoj en ia grado kapablas neŭtralizi la acidon, tamen estas menciinde, ke la acido estas malamiko de ĉiu konstruaĵo. Ĝi atakas la feron, betonon, morteron. Ĝia noca efiko estas evidenta. Acidaj poluakvoj kreiĝas unuavice en la kemia industrio, krome en la prilaboraj uzinoj de fero kaj metaloj.

Estas interese, sed eĉ pli malagrable, kiel efikas sur la akceptan akvon la poluakvoj de la celulozindustrio, preiranta la paperfabrikadon. La poluakvo estas konata sub nomo sulfitbazo, ĝia fibromaterio-enhavo estas granda. Ĉi tiu poluciaĵo donas tre bonan nutromedion por la mukoziĝo de la akcepta akvo. La polucimukozo „ekfloras" — okaze de favoraj cirkonstancoj — sur la surfaco de la akvo kaj ofte kovras la supraĵon de la akcepta akvo en plurkilometra longo. Krom tio, ke tiu vidaĵo ne estas nomebla edifa, ĝi povas adheriĝi sur la mekanismon de la akvoelĉerpaj uzinoj establitaj sur la rivero, aŭ ebliĝas ke ĝi eniĝu en la fabrikadan teknologion kaj kaŭzu funkciadajn perturbojn.

Ni prezentis nur kelkajn pli signifajn akvopoluciadojn kemiajn el la tradiciaj malpuraĵoj. La kemia polucia efiko — precipe tiu de la kemia industrio — estas en la varieco de ĝia konsisto preskaŭ senlima. La finprodukto, kiu estas en ĉiu cetero tre utila, eniĝanta la akvojn eĉ en tre malgranda kvanto, — jam kvalifikiĝas malutila polucio. Ĉe kelkaj industriejoj — ni povas citi denove la kemian industrion — eliĝas poluakvoj de diversaj kemiaj kombinaĵoj laŭ la uzineroj. Tiuj poluakvoj intermiksiĝas en la uzina kloakokanaloj kaj formas tiajn kombinaĵojn, kiuj estas tute nekonataj en la kemifabrikaj procedoj, plej ofte estas venenigaj, kaj estas malfalice aŭ tute ne malkonstrueblaj per oksidadaj procedoj. Ili dismiksigas en la akvoj, maldensiĝas, ke ne estas demonstreblaj per la tradiciaj akvoekzamenaj metodoj. Tamen pro la origino ni scias, ke ili troviĝas en la akvo, ilia noca efiko estas nur konjektebla kaj inside latenta. Ili akumuliĝas enirante en la vivulan or-



Tihany, parto de parko

ganismon tra la nutraj vojoj. Tio estas la plej danĝera polucia speco de nia tempo, la t. n. mikropolucio.

Polucio de karaktero industria povas deveni ne sole el la fabrikado, sed ankaŭ el la utiligo de la pretaj produktaĵoj. La nediskutebla avanco de la kemia industrio por la socia utileco simultane pligrandigis la eblecon kaj danĝerecon de kemiaj polucioj de akvoj. Tio lanĉis en la plej lasta tempo tutmonde la problemojn de *pesticido** kaj *detergento.***

Pesticido estas kolektiva nomo de diversaj kemiaĵoj servantaj por ŝirmado de plantoj per ekstermado de insektoj kaj *roduloj* (ronĝuloj). Sekve de la kemiizado de la agrikulturo ilia uzo abrupte disvastiĝis en la lasta tempo. Ili aperas ne en difinitaj lokoj kaj en ne koncentrita, sed en polucio tute dissemita kaj eventuala, ili estas malfacile kontroleblaj. Ĉu ili eniĝas en la akceptan akvon, tio dependas de la homa sinteno, de meteologiaj cirkonstancoj kaj de aliaj faktoroj influantaj la agrikulturan produktadon.

La sintezaj laviloj — la detergentoj — aperas ankaŭ kunlige kun ilia utiligo, kiel polociaĵoj de industria-kemia karaktero. La ŝvebiga efiko de la detergentoj ĉeestantaj en la kloakakvo kaj en la akceptanto, krome ties surfaca aktivado perturbas la purigan resp. mempurigan procezon. La larĝdimensia disvastiĝo de la sintezaj laviloj gvidis en la industrie evoluintaj landoj al plena neebleco de poluakvopurigado kaj kaŭzis la „ŝaŭmokatastrofon" de la riveroj. Tio signifas, ke dika tavolo da detergentŝaŭmo tegis la surfacon de riveroj. Hodiaŭ estas jam permesata la vendado nur de tiaj laviloj, kiuj estas kemie malkonstrueblaj.

Por nia epoko estas karakteriza la apero de radioaktivaj polucioj en la akvoj. El la nukleaj eksplodoj, el la funkciado de atomreaktoroj kaj atomenergio-centraloj, krome pro la industria, esplora kaj terapeŭtika ekuzo de emanantaj materioj eniĝas radioaktivaj materioj en la akvon. La radionukleidoj kapablas abundiĝi en la ŝlimo de akvo kaj en la animala mondo en granda mezuro, eĉ se la koncentriteco originala estis malgranda. Senpere aŭ tra la nutraĵ-serio: akvo — planktono — fiŝo, aŭ akvo — irigaciita humo — plankto, jen tiu vico ebligas, ke en certaj okazoj ankaŭ en la homa organismo povas akumuliĝi ili, kiel tion oni konstatis ĉe eskimoj sin nutrantaj per radioaktivaj fiŝoj.

La polucia efiko kaj ĝiaj konsekvencoj minacantaj la kvaliton de akvoj aperas kiel grava damaĝo en la akvouzado. Oni povas vidi, ke la kvalitaj kriterioj de la kloakakvo esence ŝanĝi-

---

**pesticido* v. HV 1975/6 paĝo 25.
***detergi:* purigi per drastaj substancoj, (oksigenakvo) (PIV); *detergento*: detergilo

ĝis en nia centjaro. Apud la ĝenerale konataj poluakvospecoj de la hejma mastrumado en granda kvanto aperis la poluciaj akvoj de la diversaj industribranĉoj en la plej varia konsisto.

Kontraŭ malpuriĝo de la akvoj unuavice oni povas sin defendi per la purigo de kloakakvoj. Kune kun la apero de poluakvoj evoluas kaj disvastiĝas la metodoj de purigo kaj altiĝas ilia teknika nivelo.

En la sfero de poluakvo-purigado unua estis la prilaboro de la metodoj per purigado de hejmaj poluakvoj. El tio evoluis la purigado de la urbaj kloakakvoj, kiu jam inkluzivas granduzinajn metodojn. Paralele kun la konstruado de publikaj kanaloj oni devis solvi la sennocan lokigon de konstante grandiĝanta kaj koncentrite aperanta poluakvo. Unusola solvo estas: konstruado de konformaj kloakakvo-purigejoj.

Ŝirmado de akvokvalito per akvoekonomiaj intervenoj

En la centro de la efektivigeblaj intervenoj por la ŝirmado de la akvokvalito estas certe la purigado de la poluakvoj, sed la akvokvalit-ŝirmado estas akcelebla eĉ okaze solvebla ankaŭ per aliaj akvoekonomiaj intervenoj. Unuavice ni povas mencii la irigaciadon per poluakvoj. Iuj industriaj akvoj (ekz. sukerindustriaj) estas speciale taŭgaj por agrokultura utiligo. En tiu kazo krom la valoro de la akvo utiliĝas ankaŭ la vegetalaj nutrosaloj.

La hejmaj kaj urbaj. krome la nutraĵindustriaj poluakvoj estas enlaseblaj ankaŭ en fiŝlagojn, ĉar tiuj akvoj enhavas ankaŭ tiajn poluaĵojn, kiujn la fiŝoj povas senpere utiligi.

La kvalito de la akvo estas plibonigebla, respektive la malutiloj de la poluakvoj malgrandigeblaj per la kolektado kaj perioda elfluigo de la poluakvoj — okaze de altaj akvoniveloj —. La reteno de tro saloza, sed cetere pura poluakvo povas esti motivita rilate la irigaciadon. Nome tia akvo miksiĝante en la irigacian akvon malutilas al la plantaĵoj. La reteno de la salaj poluakvoj, kaj ilia ellaso ekster la irigacia sezono solvas la problemon de la lokigo de poluakvoj.

Ankaŭ en kazo de tiaj poluakvoj de kemia industrio, kies purigo ankoraŭ ne estas ellaborita, — povas helpi la reteno en rezervujoj. La re-

Velŝipoj sur Balatono



Lago en Tata

teno de poluitaj akvoj en rezervujoj — okaze de ĝenerale alta akvonivelo de la akceptanta akvo, — donas eblecon por enfluigo inter favoraj purigaj kondiĉoj. Konekse kun tio ni mencias la rezervujojn de diluiĝaj akvoj, ĉe kiuj la situacio estas kontraŭa. La superfluan puran akvon de la sezono de abunda akvaro ni retenas en la rezervujoj. En periodo de malalta akvo ni delasas ĝin por dilui la akceptan akvon, kies polucion relative malgrandigas tio.

La rondo de la akvoekonomiaj intervenoj por ŝirmado de la akvokvalito iĝas ĉiam pli vasta. Ĝenerale la kompleksa uzo de diversaj metodoj alportas la deziritan rezulton. En intereso de la problemoj de akvoŝirmado ĉiam necesas kompleksa ekzamenado. Por helpi tion pretiĝas nuntempe jam regionaj planoj por solvi la ŝirmadon de akvokvalito sur teritorioj de ĉiu akvokolektejo. Tiuj ĉiokoncerne enhavas kaj subtenas ankaŭ laŭ ekonomiaj vidpunktoj la disponadojn necesajn por ŝirmado de akvopureco, respektive por la repurigo de la akvoj. Tasko de niaj hodiaŭaj tagoj estas la konstruado de tiaj sistemoj por grandaj teritorioj.

Jura reguligo por ŝirmado de akvopureco

La hungara leĝo pri la akvoaferoj, el jaro 1964 — kiu reguligas la akvocirkonstancojn, la aktivadon (en iu ajn branĉo de la popolekonomio) koneksan kun la akvoekonomio kaj ĝiaj parencaj terenoj, — deklaras kiel bazan disponon, ke oni devas ŝirmi la akvojn de tiaj efikoj, kiuj malfavore ŝanĝas ĝiajn fizikajn, kemiajn kaj biologiajn proprecojn, naturajn kvalitojn kaj sinpurigan kapablon. La fortiĝo de la socia kunlaboro kontraŭ la nocaj poluadoj de akvoj ebligas kaj necesigas kreon de tiaj sociaj organismoj — ekz. la reton de akvokvalito-observado, de komisionoj por akvoŝirmado — kiuj efike helpas,

kompletigas la laboron de akvoaferaj organoj kaj akvokvalita inspektado.

En la lastaj unu kaj duon-jardekoj aperis pluraj jurnormoj — kvankam ne akvoaferaj, sed prilaboritaj kune kun akvo-instancoj — kiuj normoj servas intensan ŝirmadon ankaŭ de la akvoj. Inter tiuj meritas apartan mencion la ediktoj de la ministro pri trafiko kaj poŝto por malhelpi la polucion de akvoj kaŭzitan de la ŝipoj, kaj ediktojn de ministroj pri agrikulturo kaj de sanitaro por ŝirmado de akvoj per preskriboj pri limigo de uzado de iuj kemiaĵoj.

Ekonomiaj reguligoj por ŝirmado de akvokvalito

Kune kun la teknikaj kaj ŝtatadministraj reguligoj de ŝirmado de la kvalito de akvoj iĝis necesa ankaŭ moderna ekonomika regulado. La reguliloj efektivigitaj en la lastaj jaroj:

— La preskriboj pri kromkotizo pro akvouzo de akvoprovizo havis la celon instigi la akvouzantojn je ŝparo de akvo, plurfoja utiligo de la akvo, elfluigo de pli malmultaj poluakvoj.

— La monpuno kaj aliaj preskriboj kontraŭ malpurigantoj de vivantaj akvoj kaj kontraŭ nocaj poluantoj de la kloakakvo-kanaloj punas ankaŭ per ekonomia plusŝarĝo la elfluiganton kaj per sia progresiva efiko instigas je konforma solvo de medioširmado.

— Sumoj formiĝantaj el la enspezoj kaj kolektiĝantaj ĉe la la Akvoafera Fondo, respektive ĉe la kanalentreprenoj, helpas la akceladon de kloakakvopurigaj instalaĵoj.

La menciitaj akvoširmadaj ordonoj kaŭzis utilan procezon ĉe la industriaj uzinoj kaj ĉe kolonioj.

Oni rigardas ĝenerale centra problemo de la evoluigo la purigon de la kloakakvoj kaj la kanalizadon. Ĉe kelkaj grandaj industriaj entreprenoj, ekz. ĉe „Nitrokemio" *Fűzfő*, ĉe Metalurgia Uzino *„Lenin"* aŭ, en urboj *Miskolc* kaj *Szombathely* komenciĝis la rekonstruaj laboroj de la akvopurigaj instalejoj kun plurmilionaj kostoj. Ties rezultoj parte jam montriĝas, aŭ en proksimaj jaroj estos senteblaj. Kvankam tiuj estas modestaj rezultoj, sed en sia tendenco ili estas favoraj. Dum en 1960 estis purigitaj 30%-oj de la elfluigitaj kloakakvoj, nun 45%-oj estas purigataj kaj ĉe kelkaj akvoj, ekz. ĉe la Danubobranĉo *Ráckeve* (ĉe Budapeŝto), ĉe rivereto *Szinva* (ĉe urbo *Mikolc)*, ĉe lago *Tatai-tó* (apud urbo *Tata)* montriĝas signoj de regenerado pro efiko de la purigado de poluakvoj.



Akvorezervujo en Orfü

Problemoj solvotaj

Je la fino de la longtempa planetapo ni kalkulas por tago po 20 milionojn da m^3 da akvokonsumadoj industria kaj doma. Proporcie kun la kreskanta akvouzo kreskas ankaŭ la polucio de akvoj, kaj la kvanto de la nocaj poluakvoj atingas la kvanton de 7 milionoj m^3 / tago. Oni devas certigi tian efikan poluakvo-purigadon kaj lokigon, kio jam sur loko de la estiĝo laŭeble eliminas, ke nocaj poluakvoj povu flui en la riverojn, akvofluojn kaj lagojn.

Por ĉesigi la nocadojn pretiĝis regionaj akvokvalitaj planoj kaj programoj por teritorioj de la plejgrave poluitaj akvokolektejoj. Ĉi tiujn programojn oni devas efektivigi je la fino de la longtempa planetapo. Baza celo estas, ke oni devas strebadi ne por la ĉesigo de la nocoj, sed por anticipado.



La rivereto Szinva ĉe Miskolc

Oni devas pretiĝi por ŝirmado kontraŭ la novaj poluciaj materioj, kiel ekz. la jam menciitaj detergentoj, emanaciaj materioj, novaj poluaĵoj estiĝantaj pro evoluo de la kemia industrio, — kaj kontraŭ la tre utilaj, sed manke de konforma lokigo ege nocaj poluakvoj devenantaj el agrikulturaj koncentraj brutoedukejoj.

La solvado de medioŝirmadaj problemoj — inter ili la akvoŝirmado trapasas la naciajn limojn. Sole la efika kunlaborado kun la najbaraj landoj, reciproka estimo de la interesoj kaj la efektivigo — akordita fare de akvoekonomiaj intervenoj interne de geografie unueca teritorio — povas rezulti sukcesan lukton en la ŝirmado de akvoj.

El akvokvalita vidpunkto estas grandsignifaj tiuj rezultoj, kiujn ni jam atingis dum kunlaboro kun la najbaraj landoj. La solidigon de laŭtempaj akvoŝirmadaj sistemoj servas akvokvaliton ŝirmantaj modelterenoj konstruataj sub apogo de la Evoluiga Fondo de UNO sur la akvokolektejo de Danubo, kaj en la valo de rivero *Sajó*, ambaŭ en Hungario. Ĉi lasta estos modelo de la hungara kompleksa reguligo de akvokvalito-ŝirmado.

Surbaze de la Kompleksa Programo de tiurilataj konstantaj komisionoj de Reciproka Ekonomia Helpo, kaj en kadro de la Konferenco de Akvoaferaj Gvidantoj energie komenciĝis la ekzameno de problemoj koneksaj kun la homa medio. Ekspertoj de la membro-ŝtatoj jam pli frue okupiĝis pri tiu temaro. En 1971 ili plurfoje konsilis kaj prilaboris la „Regularon servanta la ŝirmadon de la naturo". Dum ties prilaborado ili konceptis sekvan celon: „Pretigo de la kompleksaj sciencaj laboradoj konekse kun la ŝanĝoj en la naturo, sekvantaj la homan aktivadon, — studado de biologiaj cirkonstancoj de la loĝantaro en la ŝanĝita medio, prilaboro de la plej raciaj metodoj por la utiligo de la naturaj energifontoj, konservado kaj renovigo de tiuj." Tiu celaro estas iom multfaceta. La ekspertoj de la ŝtatomembroj decidis ekzamenon de scienca, teknika-ekonomia, socia, organiza kaj jura aspektoj de tiu multfaceta problemaro.

Ĉe la pli detala prilaboro de la kunlaboraj programoj, ĉiu agadbranĉo devas atenti la rezultojn de la sciencaj kaj teknikaj esploroj, kaj la eblecojn de la praktika efektivigo. Aparte oni devas priatenti la eblecojn de la ŝtatomembroj. Radikale oni devas studi la eblecojn de fabrikado de instrumentoj por la mezurado de mediopolucioj kaj por la purigaj instalaĵoj, krome ties kooperadajn kaj specialigajn eblecojn, kaj la pritaksadon de la bezonaĵoj. Kalkulendaj estas laŭeble plej granda respekto al la evolua sistemo de scienco kaj tekniko.

Je efiko de la ĝis nun faritaj disponoj jam montriĝas rezultoj de la organizita akvoŝirmado, moderiĝis la ĝisnuna poluado de la akvoj. Taskoj de la futuro tamen postulas plian fortostreĉadojn, ja la kvanto de la industria kaj doma poluakvoj kreskos dum la sekvanta unu kaj duono-jardekoj de la taga 3 milionoj je 7 milionoj. Paralele kreskas niaj devoj por la ŝirmado de akvoj kontraŭ la danĝero de polucio.

Oni devas apartan zorgon havi por akvo-ŝirmado de niaj lagoj de netaksebla valoro. Inter tiuj nia speciala nacia fiero: la lagoj Balatono signifon, ja tiujn vizitas centmiloj de enlandaj kaj la renaskiĝanta *Velencei-tó* havas eminentan kaj eksterlandaj turistoj ĝuste tial, ĉar ilia akvo estas speciale konforma por banado. Nun ankoraŭ ne estas malfrue, rezervi ties hodiaŭan staton por la futuro.

Tr. A. *Pechan*

La multlingveco kaŭzas zorgojn ankaŭ al UNESKO

Konversacio kun Sándor Maller, ĉefsekretario de la Hungara UNESKO-Komitato

Mihály *Gergely:* La legantojn de *Eszperantó Magazin* kaj *Hungara Vivo* tre interesus: kion povas diri pri la problemoj kaj eblaj solvoj de la multlingveco d-ro Sándor *Maller,* ĉefsekretario de la Hungara UNESKO-Komitato kaj posedanto de sennombraj lingvaj spertoj?

Sándor *Maller:* Mi konatiĝis kun Esperanto kiel dekjara lernanto, en urbo *Sárospatak.* Mi loĝis en la sama domkorto, kie mia klasestro, Sándor *Hallgató,* kiu, kvankam estis naturhistorio-kemio-faka profesoro, parolis germane, france, itale, Esperante. Li korespondis kun multaj eksterlandanoj, partoprenis kongresojn; li estis, kiu prezentis al mi Esperanton kiel ege taŭgan lingvan ilon de rilato inter homoj parolantaj diversajn gepatrajn lingvojn.

Mi scias, ke UNESKO membrigis Universalan E-Asocion en 1954, en sia asembleo (nun ĝi apartenas al B-kategoriaj membroj), rekonante tiel la kulturajn valorojn de la lingvo kaj ĝia movado. Kial UNESKO ne povis fari plion, kial, ekzemple ĝi ne povis vicigi Esperanton inter siajn oficialajn lingvojn? — Mi pensas, ke ties kaŭzo estis, ke malantaŭ Esperanto staris neniu politika potenco, neniu aŭtoritato de iu granda lando. Kial ĝuste la angla kaj la franca fariĝis laborlingvoj de UNESKO en 1946, jaro de la fondiĝo? Ĉar ili estis oficialaj ŝtataj lingvoj ne nur de Anglio kaj Usono, sed de multaj landoj. Oficialiĝis la lingvoj hispana, rusa, poste la ĉina kaj araba; sekve, UNESKO nuntempe havas ses oficialajn lingvojn. Tiuj lingvoj estas uzataj en ĉiuj du-jaraj asembleoj kaj en ĉiuj konferencoj ĉu interkabinetaj, ĉu interministraj, ĉu interekspertaj, kiujn partoprenas ĉiu membrolando. Nome, oni devas redakti en ses lingvoj la antaŭ-, dum- kaj postasembleajn dokumentojn kaj la dum-asemblean gazeton . . .

MG: Do tio kostas multegan monon kaj laboron en la funkciado de unu sola internacia organizaĵo, la UNESKO!?

Sándor *Maller:* Eĉ estas malfacile diri, kiom tio kostas . . . Sed, se la problemo havus nur ekonomiajn flankojn! . . . Ĉiu, kiu jam partoprenis internacian konferencon, kaj alparolis ne en sia gepatra lingvo, povis sin senti en malavantaĝo. Tiom granda estas la malavantaĝo, ke oni jam eĉ ne povas prirideti tiun japanan delegiton, kiu, indignante pro la lingva hontigo, — en iu UNESKO-interkonsiliĝo proponis: oni devus rezolucii, ke al la delegitoj estas malpermesate alparoli gepatro-lingve! . . . Facile ni komprenas tiun japanan delegiton, se ni spertas, kion signifas la gepatro-lingva argumentado en la internaciaj konferencoj. Tio estas nevenkebla avantaĝo. Postulatas speciala antaŭpreparĝo por esti diskutkapabla en alia lingvo ol la gepatra, en la forumoj de UNO aŭ UNESKO. Tamen, en tiuj mondorganizaĵoj, neniu el la oficialigitaj lingvoj estas gepatra lingvo de granda parto de membrolandaj delegitoj. Tial la plejmultaj alparolantoj ja devas fiparoli, balbuti en la elektita oficiala lingvo, kaj nur malfacile povas sin kompreneble esprimi klare kaj precize. Do, tiuj kiuj scias paroli en sia propra lingvo, ĝuas grandan avantaĝon . . . Jes, en tiaj cirkonstancoj certe al multaj venas la penso: kiom pli bone estus, se ankaŭ en tiuj konferencoj oni uzus unu solan perantan lingvon!

MG: Ekde kelkaj jaroj, kiel gazetredaktoro mi okupiĝas laŭ profesio pri la problemaro de l'multlingveco de nia epoko. Mi alvenis al konkludo: dum certa tempo ankoraŭ eblas malatenti kaj prokrasti la temon, sed pasintaj dek aŭ dudek jaroj, la rapidritma teknika evoluo, la pretendoj de centmilionaj amasoj pri veturado, kaj la komunikada bankroto kaŭze de informajalfluo fariĝos faktoroj, kiuj envicigos ĝin en la tagordon de UNO-forumo. Laŭ Vi, kiaj eblecoj estas por tio, ke intertempe, kvazaŭ prepar-karaktere, la UNESKO kiel unu el la plej gravaj forumoj de UNO, okupiĝu pri la problemo?

S. *Maller:* La sekva asembleo de UNESKO okazas en la Afrika *Nairobi,* en oktobro de tiu ĉi jaro. Kvankam nur la membrolandoj rajtas proponi tagordan temon pere de la Plenum-Konsilantaro de UNESKO, tamen Universala E-Asocio, kiel internacia organizaĵo de ege grava kaj speciala movado, povus sukcese provi la peton pri envicigo de l'temo en la tagordon de la asembleo. Kvankam vere, la membrolandoj faris siajn proponojn jam fine de la pasinta jaro . . .

MG: Eĉ tio estus ĝojiga fakto, se nur la UNESKO-asembleo okazonta post du jaroj okupiĝus pri la temo. Kaj ĉar por la preparĝoj ni havos pli multan tempon, la iniciato havos, ĉiumaniere, pli da ŝancoj. Mi kore dankas la ideon kaj la konversacion.

Mária Rózsa Szabó

REVUO DE REVUOJ

La plimulto de la laste aperintaj revuoj okupiĝas pri eldonaĵoj Esperantlingvaj. Rilate la eldonplanadojn de la landaj asocioj ni povas konstati kun ĝojo, ke iom post iom troviĝas pli da metodeco, sistemeco ol antaŭe en la movado.

En februara numero de LITERATURA FOIRO (1976/35) oni povas legi interesajn problemojn pri la Belartaj Konkursoj. En tiu artikolo Alec *Venture*, sekretario de BK, tre bedaŭras, ke la praktikaj malfacilaĵoj de la juĝo, de la komparo de artaj valoroj devigis BK forigi la tradukajn branĉojn. Jam Zamenhof opiniis, ke tradukado estas pli malfacila ol originala verkado! Carlo *Minnaja*, komisionano de BK, skribas: ĉu eblas, ke tiel diversajn tradukajojn prijuĝu nekompetentuloj (en tiu situacio estas juĝantoj, kiuj ne kapablas eksperte taksi la valoron de la tradukaĵoj). Aliĝante al tiu diskuto, ni opinias, ke tiu reduktita konkurso ne estos taŭga por plukonstrui la plej signifan parton de la internacilingva literaturo. Tamen ne indas tro ĉagreniĝi pri tio, ĉar BK estas nur unu „foiro" por la novaj literaturaj produktaĵoj; aliparte mem BK povus malfermi konkurson pri temoj difinitaj, ekzemple pri pacbatala laboro nacie kaj internacie, pri rolo de la virinoj en epoko de la scienca-teknika revolucio, pri aliaj modernaj problemoj, kaj tiel plu. La komisiono jam decidis, ke BK havos de 1976 nur tri literaturajn branĉojn: originalaj poezio, prozo kaj teatraĵo.

Ankaŭ pri la „sentraduka" BK okupiĝas la NORVEGA ESPERANTISTO en numero 1976/1. Ni arde deziras sukceson al la novigita konkurso, kaj samtempe kuraĝigas la esperantistojn plu fari tradukaĵojn, sendepende de BK, utiligante aŭspiciojn de la landaj asocioj.

La NOV-ZELANDA ESPERANTISTO en numero 1976/1 okupiĝas pri la fotokopia reeldonaĵo japana de ĉiuj numeroj de LITERATURA MONDO. Petolulo skribas: „Literatura Mondo estas trezorejo neelĉerpebla de niaj lingvo, kulturo kaj movado. Dudek kvin jarojn post sia malapero ĝi ankoraŭ havas grandan influon en Esperantio. „Kiel mi komentis pli frue — skribas Petolulo —, mi miris pri la kuraĝo de la japanoj. Sed ili ja sukcesis. La kompleta serio konsistas el ses grandformataj, tole binditaj volumoj. La reproduktado estas fidela kaj senriproĉa." Ni, hungaroj kun dankego primemoras niajn grandulojn, kiuj florigis la *Budapeŝtan Skolon*, kaj ni alte taksas la valoran laboron de tiuj japanoj, kiuj efektivigis reeldonon de la epokfara Literatura Mondo.

Ŝajnas grava la alvoko de ELNA (E-Ligo de Norda Ameriko) NEWSLETTER en numero 1976/januaro—februaro, kiu temas pri: „Esperanto en la bibliotekojn!" Ĝi insistas pluan kolekton tiurilate, kaj kontaktojn interbibliotekajn.

La INTERNACIA GAZETARA SERVO de UEA en numero 1976/202 okupiĝas pri Esperanto kiel solvo de lingvaj malfacilaĵoj en la t.n. Eŭropa Parlamento (kun demandosigno). La artikolo respondas jese, menciante, ke la kosto de la lingva proceduro en la Eŭropa Komuna Merkato estis jam temo lastatempe en ties Strasburga kunveno. La brita Tom *Normanton* (Konservativa Partio) sugestis dum tiu kunveno, ke la Internacia Lingvo Esperanto eble pruviĝus pli bona kaj malpli kosta solvo. Kiel IGS skribas, jam 57 britaj parlamentanoj kuniĝis en grupo, kiu subtenas uzon de Esperanto en internaciaj aferoj.

La hungaraj esperantistoj letere turnis sin (decembro 1975) al la hungaraj parlamentanoj pledante por uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj: estas komprenebla nia intereso atente sekvi la evoluojn en aliaj landoj.

La ĉefministro de Svedio, Olaf *Palme* esprimis fortan subtenon por Esperanto en salutletero al la Sveda Laborista Esperanto-Asocio — sciigas THE WORKER ESPERANTIST en numero 1976/majo. Ankaŭ tiu numero informas pri la 50-jara jubilea festo de la svisa asocio de esperantistaj fervojistoj, kiun partoprenis 146 personoj el 14 landoj kaj 3 kontinentoj. Multaj oficialaj instancoj sendis gratulojn okaze de tiu jubileo; al tio ankaŭ ni aliĝas nun.

Per Esperantlingva broŝuro memorigas la mondon pri la suferoj de la ĉilia popolo la Defend-Komitato por Politikaj Malliberuloj en Ĉilio, rezidanta en Parizo. La titolo de la broŝuro estas: NI SAVU LA POLITIKAJN MALLIBERULOJN EN ĈILIO. Nemezurebla aflikto kaptas la leganton de la Esperantlingva alvoko... ankaŭ ni deziras plej rapidan liberiĝon por la suferanta popolo de Ĉilio.

Por la paco

„Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo". *Bratislava* 1976. Eld. Ĉeĥoslovaka Packomitato kaj Slovaka Packonsilantaro, kunlabore kun Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko.

Recenzon oni ne povas skribi pri ĉi tiu eldonaĵo, ĉar ĝia enhavo estas la rezulto de dujara laborado kaj la aŭtoroj estas la Eŭropaj popoloj mem, kiuj per ĉi tiu „fina akto" metis la bazon de la nova Eŭropo. La dokumenton subskribis la plej altaj politikaj gvidantoj de 35 ŝtatoj, la 1-an de aŭgusto 1975.

Ĝoje ni povas saluti la aperon de ĉi tiu historia dokumento en Esperanto, kiu pruvas, ke oni povas traduki Esperanten ĉiuspecajn internaciajn dokumenton, ĉarton, kontrakton, konvencion. (Ekz. Homaj rajtoj, Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj ktp.) La „fina akto" estas nova pruvo.

La eldonaĵon tradukis P. *Rosa;* la tradukon kontrolis kaj komparis ĝin kun la originala germana teksto D. *Blanke* kaj R. *Graetz* (Berlino, GDR).

Kion pri la traduko? La — cetere ne facila — teksto estas facile komprenebla. Mi komparis kelkajn partojn kun la hungara traduko, kaj retradukinte la Esperantan tekston hungaren, mi ne trovis grandan diferencon inter la du tekstoj.

Kiel mi informiĝis, ankaŭ la sovetaj esperantistoj tradukas la „finan akton", kaj kiu scias, eble ankoraŭ pretiĝas kelkaj tradukoj. Ĉiukaze estus pli bona la kunlaboro kaj la reciproka kontrolo de la tekstoj kaj eldoni ĝin kun komuna teksto, kaj tiel ni havus unu oficalan tradukon.

Cetere mi opinias, ke alvenis jam la tempo ke UEA prizorgu pri la aperigo de la Esperanta Diplomatia Vortaro, aŭ apogu ties preparadon. Sen faklingvo kaj sen faklingvon perfekte parolantaj esperantistoj ni ne havas ŝancon sur la lingvobatalkampo de la mondo.

D-ro István *Nagy*



Gyula Feledy: La maljuna poeto

ERO

Cetere, kredu,
la grekaj floroj tute ne estis ravaj,
al mi ili ridis false, kaj la
ungoj volis grati ĉi pimpan surfacon por traarki reale
dek unu jarojn, kaj senpense ripozigi la kapon
en via sino . . .

V. *Benczik*

NOVA VORTARO ESPERANTA- KAMBOĜA

Ĵus aperis la unua vortaro en la serio de vortaroj por parolantoj de ekstereŭropaj lingvoj, kies eldono estas instigata de UEA en la kadro de la tiel nomata „Regiona Agado".

Temas pri vortaro Esperanta-kamboĝa verkita de du junaj Kamboĝaj esperantistoj, kiuj lernis Esperanton en la konata TESCO-kolegio en Budapeŝto.

La nova vortaro, kiu ampleksas proksimume 2500 vortojn, estis presita de Hungara Esperanto-Asocio, kiu tiamaniere helpis Regionan Agadon de UEA per elspezoj, kiuj egalvaloras pli ol 3000 guldenojn.

Kvanto de tiuj-ĉi vortaroj jam vojaĝis al Kamboĝo en la valizoj de studentoj reirintaj hejmen.

Ekstereŭropanoj, kiuj deziras verki similajn vortarojn, kaj Landaj Asocioj, kiuj deziras same grandanime helpi, bonvolu kontakti la respondeculon pri Regiona Agado de UEA, Renato *Corsetti* Via Strabone, 1, 00176 Roma, Italio.

Paĝo de FERI'

El Proverbaro Esperanta



En la ĉefaj linioj de nia enigmo ni kaŝis du proverbojn. (Horizontale 1. kaj vertikale 14.) Ensendi sufiĉas solvon de tiuj vicoj, ĝis la 15-a de novembro.

HORIZONTALAJ VICOJ: 14. Prepozicio. 15. Germana urbo apud la rivero *Mosel*. 16. Ĉefurbo de Skotlando. 17. Genro de naĝkapablaj moluskoj el la klaso de lamenbrankuloj. 19. Rilata al Eŭropa ĉefurbo. 21. Personoj apartenantaj al iu grupo (Radiko). 22. Bor-aparato (R). 23. Ĉiu aparta peco de metalmono. 24. Fabrika. 25. Japana versformo, konsistanta el la ripetado de kvinkaj sepsilabaj versoj laŭ diversaj kombinoj (R). 26. La sankta libro de la Islamanoj. 27. Fama irana filozofo kaj kuracisto (980—1037, arablingva nomo Abu ibn Sina), sen-o finaĵo. 28. Masurio. 29. Pafilego. 30. Malplena interspaco, kava loko en solida korpo (R). 31. Mezo de diodo! 32. Perforte apartigu partojn de objekto per tirado! 33. Mezo de foiro! 35. Grasa likvaĵo, industria krudmaterialo. 37. Afrikajn rabobestojn. 40. Plisita strio, uzata sur virina vestaĵo (R). 42. Valora metalo (R). 43. Sufikso. 44. Forte soni, senharmonie. 45. Miksita ilo! 47. Granda ujo el maldelikata teksaĵo (R). 49. Ĉe la mano. 51. Duona ogro! 52. Natrio. 54. Ideala modelo (R). 56. Ano de bando de junaj stratulaĉoj (R). 58. Rilata al la motoro de la sango-cirkula sistemo. 60. Imagi tion, kion oni forte deziras (R). 62. Tuto de religiaj ceremonioj. 63. Frakcia. 65. 1600 — per romiaj ciferoj. 66. Fiziologia daŭra muskola kontrahiĝo. 68. Samspecaj literoj de salo. 69. Normanda insulo. 71. Turniĝi ĉirkaŭ interna akso (R). 72. OPU. 73. Tio, kio faras iun havanta opinion konforman al la vero. 74. Sendi iun, kiel reprezentanton. 75. Ilo por skribi sur nigran tabulon (R). 76. Eligi radiojn precepteblajn per okuloj, por vidi objektojn. 77. Ministro en la islamaj landoj. 78. Pasie deziranta kolekti riĉaĵojn kaj domaĝanta ilin elspezi. 79. Opinii ion tiel sama, ke oni ne povas percepti ian diferencon. 81. Rilata al gento loĝanta en Egiptio. 83. Samspecaj literoj de taso.

VERTIKALAJ VICOJ: 1. Rilata al delikata, kaprica flugeto. 2. Tre malmola metal-alojo. 3. Valora metalo. 4. Respektoplena al Dio (R). 5. Ronĝulo. 6. Loĝanto en Azia ŝtato kies ĉefurbo estas Teherano. 7. Alproksimiĝo al sama loko kie oni estis. 8. Speco de hakilo. 9. Posedpronomo. 10. DN. 11. Perdo de la marŝkapablo (R). 12. Provizo da pafaĵoj. 13. Artikulo, kiu teksas reton. 18. Posedpronomo. 20. Franca impresionisma pentristo kaj skulptisto (Auguste, 1841—1919). 23. Saketo por pagiloj. 24. Mola apendico, pendanta ĉe la mezo de la posta rando de la palata velo ĉe mamuloj. 26. Unu el la kvar emblemoj de la ludkartoj (R). 27. Amaso. 29. Grava drogo. 32. Miksita ŝuo! 34. Ano de ĉefgento loĝanta inter Karpatoj kaj Uralo, la Blanka kaj Nigra Maroj (R). 36. Piulo loĝanta en soleco. 38. Unuo de laboro en la CGS-sistemo (R). 39. Cilindra metala peco por frapkunigado (R). 41. Titolo de la reĝo de Persio (R). 43. Frakcia sufikso. 46. Antikva muzikinstrumento (R). 48. Prizorgi malsanulon. 50. Ekstera montro de ies forto aŭ kapablo. 53. La militista forto de unu ŝtato. 55. Agadi ŝerce, sendiscipline, senkonsidere, kontraŭ la reguloj de bonkonduto. 57. Unudimensia kontinua aro de punktoj (R). 58. Dolĉaĵo (R). 59. Elstara hungara poeto de la XX-a jarcento (Endre, Andreo 1877—1919). 61. Homo, kiu maljuniĝis, plenumante profesion aŭ specialan okupon (R). 64. Nobel-premiita Ĉilia poeto (Pablo). 67. Nobel-premiita hinda poeto kaj verkisto (Rabindranath). 68. Travivu! 70. Ripete moveti ion en la aero tien-reen (R). 71. Konstante kaj oficiale loĝi en loko mem, en kiu oni plenumas ian funkcion (R). 72. Farita el valora metalo. 74. Bonvoli, konsenti fari, sentigante tamen ian moŝtecan komplezon (R). 75. Ranbleki (R). 77. Posedpronomo. 78. Parto de fabelo! 80. Duono de truo! 82. Prepozicio.

La ĝusta solvo de nia „Konkursa Enigmo" aperinta en HV 76/3 estas: „Ne laŭ la voĉo de la kok' tagiĝas, sed krias koko, ĉar tagiĝas jam." (La tragedio de l' homo; Kalocsay).

Inter ensendintoj de la ĝusta solvo la ĉefpremion gajnis: Ing. Vladimir Nemec, Hliny 722 A olo ol ZILINA 1/ ČSSR.

La ĉefpremio rajtigas nian leganton senpage partopreni la ĉijaran (jam tradician) silvestran intarnacian arangajon de Budapesta Teritorio Komitato de HEA: la Vintra Esperantista Ferio-n. Gratulon!

Niajn kutimajn libropremiojn gajnis: Georgo Tkeŝelaŝvili el Tbilisi, Sovetunio; Bálint Zoltán, Várpalota; kaj Garam Melánia, Pécs el Hungario.

Lingvaj ludoj

Por nova tasko ni prezentas al vi la *Mozaik-ludon*, jam de pluraj aŭtoroj proponitan. La tasko estas: el distrancitaj elementoj, segmentoj, kompili senchavan frazon. Ekzemple: el la sekvaj liter-grupoj oni povas kompili Zamenhof-an proverbon.

MAN AES IOB TAS NEĈ ANT RIL DIA TO

Ni ne signis la komencan mozaikon, ĉar ni opinias, ke eĉ sen tio oni povas diveni nur unusolan, t. e. la ĝustan solvon.

Kiun? — nur unusolan: *Ne ĉio brilanta estas diamanto.*

Ĉi tie ni mencias, ke la ludojn de ni proponitajn aŭ priskribitajn oni povas ludi ankaŭ dum klub-kunvenoj, lingvo-kursoj por lingva perfektigado kaj ekzercado.

Ankaŭ niajn novajn solvendaĵojn ni ĉerpis el „Proverbaro Esperanta":

1. EGA FOR MĜI ARM EST ERO GUF NDU ASU
2. DOSE AULA BOJA NPUN SUNO ONTR DEĈK SHUN

Kiujn proverbojn ni dispecetigis? Sendu al ni la solvon. Limdato: kiel tiu de krucenigmo.

ŜAKO

"Gens una sumus" – Unu gento ni estas

Rubrikĉefo: D-ro Jozefo Németh

2-a numero

GYÖRGY BAKCSI

Bl.: Rf3, Da3, Tb7, Ĉb4, Ĉd5, Ka2, Kf8, c2, d3 (9)

Ng.: Rc5, Dd6, Ĉe8, Kg7, a4, a7, c3, f4 (8)

Limbato de la solvo: 20-a de novembro 1976.

La solvo de la 1-a problemo: 1. Ĉh5! Ne estas bonaj: 1. Ĉf6? 2. Ta3! 1. Ĉe8? 2. Kg7! (mallongigojn vidu HV 1976/4)

* * *

SUKCESO! Urbo Kalocsa aranĝis ŝakproblem-turniron internacian, ĝis la limdato 240 (!!!) ŝakproblemoj (konkursverkoj) alvenis el 18 landoj, de 95 ŝakproblemistoj kaj 5 de esperantistaj ŝakludistoj!

La premiojn la aranĝantoj transdonis en aŭgusto en urbo Kalocsa.

* * *

Esperanta ŝak-grupo Hungarlanda formiĝos! Interesiĝantoj bonvolu informiĝi ĉe rubrikĉefo.

* * *

Urbo Kalocsa aranĝos korespondan ŝakturniron internacian. Interesiĝantoj bonvolu informiĝi ĉe rubrikĉefo ĝis 30. oktobro 1976.

* * *

Ŝak-leksikoneto (2)

Signoj: Bl. — blanko
Ng. — nigro
= — egalstato
x aŭ: — kaptas (prenas) pecon
+ — ŝakanonco
++ — duobla ŝakanonco
≠ — mato
? — malforta movo
?? — tre malforta movo
! — forta movo
!! — tre forta movo
0—0 — aroketo
0-0-0 — arokego

KALENDARO

1856—10—08 Antaŭ 120 jaroj naskiĝis John Mabon *Warden,* skota esperantisto, ekde 1931 prezidanto de la Akademio. Li redaktis la britan eldonon de la Biblio.

1861—10—10 Antaŭ 115 jaroj naskiĝis Fridtjof *Nansen,* Nobel-premiita norvega esploristo de la polusa regiono.

1811—10—22 Antaŭ 165 jaroj naskiĝis Ferenc *Liszt,* hungara komponisto kaj fortepianisto, elstara figuro de la romantisma muzika stilo. Vidu HV 62/1.

1901—10—23 Antaŭ 75 jaroj naskiĝis Ivo *Rotkvić* kroata esperantisto, akademiano, fama tradukinto de la *Jelušić*-romano: „Cezaro".

1601—10—24 Antaŭ 375 jaroj mortis Tycho de *Brahe,* dana astronomo. Laŭ liaj esploroj ellaboris la leĝojn de la astro-moviĝo Johannes *Kepler,* germana astronomo kaj matematikisto.

1881—10—26 Antaŭ 95 jaroj naskiĝis Emile *Gasse,* franca esperantisto, tradukisto. Li tradukis la Balzac-romanon: *„Eugenino Grandet".*

1936—11—03 Antaŭ 40 jaroj mortis Dezső *Kosztolányi,* elstara hungara poeto, arttradukisto kaj verkisto. Vidu HV 66/1.

1831—11—14 Antaŭ 145 jaroj mortis Fridrich *Hegel,* germana idealisma filozofo, unu el la pioniroj de la ellaboro de la dialektika metodo.

1916—11—15 Antaŭ 60 jaroj mortis Henryk *Sienkiewicz,* Nobel-premiita pola verkisto, aŭtoro de la romano *„Quo vadis".*

1856—11—20 Antaŭ 120 jaroj mortis Farkas *Bolyai,* hungara matematikisto, natursciencisto kaj dramverkisto. Lia filo János *Bolyai* ellaboris la absolutan geometrion. Vidu HV 61/1 Inter aliaj li okupiĝis pri la mondlingva problemo. Vidu: Gvidlibro por supera ekzameno II./2.

Komp: L. *Rieth*

Humuro

Kvar viroj ludas karton. Abrupte unu el ili, sinjoro Verd, falas de la seĝo. Li mortis je apopleksio. La tri viroj konsterniĝas, kompreneble poste leviĝas antaŭ ili la problemo, kiel sciigi la vidvinon pri la trista okazaĵo kun plejeble delikata takto. Fine sinjoro Blank surprenas la funebran taskon, kaj iras en la loĝejon de Verd. Li trovas tie la edzinon kaj demandas:

— Ĉu tie ĉi logas vidvino Verd?

— Mi estas la edzino de Verd — respondas la virino —, sed mi ne estas vidvino.

— Per kio veti — diras Blank —, ke vi estas vidvino?

* * *

Sinjoro Kacor ekprocesis kontraŭ sia najbaro Frip pro honor-ofendo.

— Oni akuzas vin pri tio — diras la juĝisto —, ke vi nomis vian hundon Kacor kaj oftege ĝin alkriis: fi, fi, Kacor. Per tio evidente vi volis insulti vian najbaron.

— Ĕrare, sinjoro juĝisto — protestas Frip. — Per tio mi volis insulti mian hundon.

Kuraĝigis kaj firmigis min la deziro:
esti inda je fido kaj amo de la popolo!

(F. Rákóczi: Memoraĵoj)

Leterkesto

Pli grandan reeĥon ol aliaj numeroj vekis HV 76/2 (pri sciencfikcia literaturo), pro tio ni citas precipe el la leteroj koncernantaj ĉi-temon.

Membroj de *Junulara Esperanto —Klubo de Ufa* (Sovetunio) plezure tralegis la menciitan numeron, eĉ ili sciigas nin, ke „tiu ĉi numero forte impresis niajn amikojn kaj konatulojn-neesperantistojn; kaj eble eĉ ŝancelis kelkies malrespektajn opiniojn pri eblecoj de Esperanto."

Post mencio de pluraj sovetaj sciencifikciaj verkistoj la letersendintaj gejunuloj proponis al ni tradukojn mem faritajn el tiu ĝenro. — Kiel vi vidis, la temo nin interesas; kaj se la nivelo de la tradukoj ne postrestas tiun de la originalo — la manuskriptoj estos bonvenigataj.

„Nova sciencfikcia literaturo devas esti ne nur originala kaj kuraĝa, sed ankaŭ arte fruktodona, kapabla naski novan opinion, novan aspekton pri la esploroj, problemoj „homo kaj scienc-teĥnika revolucio"; samtempe ĝi devas havi ankaŭ belartan prognozon de la futuro.

Bedaŭrinde multaj aŭtoroj priskribas la fantazion epigone, duagrade, laŭforme, kun malriĉa penso... kion oni povas diri ankaŭ pri kelkaj rakontoj en la koncerna numero de HV" — skribis K. *Istomin,* ankaŭ el Sovetunio.

Oskar *Stolberg,* estrarano de Leipziga Laborgrupo el GDR skribas: „Mi abonas dek revuojn, sed neniu aperas tiel akurate kaj regule, kiel la via. Krome oni ĝojas ĉiufoje pri la enhavriĉa kajero. Ni esperantistoj deziras, ke via letero al la III-a Tuteŭropa Konferenco de sciencfikciaj verkistoj en *Poznan,* bonsukcesu."

„Permesu al mi gratuli vin pro la numeroj pri *Szilágyi* kaj *Tárkony.* Per tiaj esploroj pri la plej gravaj hungaraj E-verkistoj, vi havigas al vi ĉiam pli vastan eksterhungarian abonantaron... Mi tre esperas, ke vi daŭrigos vian politikon pri specialaj numeroj pli-malpli alterne dediĉitaj por temoj hungaraj kaj Esperantaj. Per tio vi certe kaptos legantojn, kiuj ne multe interesiĝus pri Hungario sen ricevo de la revuo, kaj kiuj ne abonus ĝin sen la pli „vergaj" numeroj. Tiel do vi plej efike servas ankaŭ al Hungario." — Ni citis el la letero de s-ro Charles R. L. *Power,* direktoro de Centra oficejo de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko.

R. *Arnaudova* el Bulgario letere raportis pri funebra celebro memore al Kalocsay — pri iniciato kaj aranĝaĵo de Literatura Esperanto Rondo en Sofio, kiu okazis la 19-an de majo. Al la memorvespero kontribuis, krom ŝi, la poetoj Asen *Grigorov* kaj Simeon *Simeonov,* Miĥail *Ĉobanov,* Ĵorĵeta *Zdraveva,* Belka *Belava* kaj pluraj gejunuloj. „Asen Grigorov kaj Simeon Simeonov per siaj poemoj prikantis la grandan faron de Kalocsay, kies poezia heredaĵo lumas kiel torĉo montrante pinton de la Esperanto-literaturo" — finis s-ino Arnaudova.

Maxe *Blondel,* Lambersert, Francio: aboni nian revuon vi povas ĉe perantoj ankaŭ en Francio; ilia adreso troveblas en aparta tabulo sur niaj lastaj paĝoj.

Jiri *Korinek,* Usti n. Labem, Ĉeĥosl.: ĉu vi igas nin esti tro fiera je HV? Vi laŭdas ja ĝin kiel „nuntempe la plej bonan E-magazinon, indan heredanton de la glorfama Literatura Mondo". Estus brave jam, se ni iomete povas sekvi ties spurojn. — Plezure ni informiĝis pri aktorino Eva Seemannová, kiu parkeras jam amason de E-poemoj, deklamatajn dum kunvenoj.

Viljandia E-Klubo, Sov. Estonio: via Hungara Vespero kun varia programo ŝajnas lerte organizita! Apud tradukoj de Petőfi-poemoj prezenti ankaŭ pri geografio kaj historio de Hungarlando, certe liveris plurflankajn konojn al la publiko. Tra grandaj distancoj ligas naciojn jena maniero, uzo de internacia neŭtrala lingvo!

E-Klubo Verda Brigantino, Talgar, Kazaha SSR; viaj bondeziroj okaze de la Tago de Venko estu reciprokaj: ke meze de Azio vi fervore legas HV nepre entuziasmigas nian respondecon, por redakti plejeble altnivelan revuon.

F. W. Poppeck, Oberkirch, Okcid. Germanio: prave, malaktiveco de multaj E-istoj, kiuj ne skribas al radiostacioj dissendataj E-programon, multe malhelpas insistan agadon de kelkaj lokaj fervoruloj! Eĉ simplaj salutvortoj pezas multe ĉe la radiostacioj, despli oni devas ĉiam ajn prononci ties gravecon — bona ideo subskribigi komunan poŝtkarton, leteron dum kunvenoj.

Ferenc Tóth, Budapest, 1184: disvastigi E-on inter sportistoj vere bezonas specialan sport-fakvortaron. Vian grandan vortkolekton proponu al redaktoro de la Sporta Lingvo de E. (T. Ujlaky-Nagy) eldonita en 1972. Vian adreson ni jam transdonis.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368 Budapest, Hungario,
VIII. Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XV. jaro. 1976. 5-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro István Nagy
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, d-ro Lajos Lesznai, László Rieth, Mária Rózsa Szabó, Tibor Ujlaki-Nagy, Zsuzsa Varga-Haszonits

Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi, Lajos Tárkony

Redakcio: Budapest VIII.,
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141-078, 137-872

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepeno, Budapest VII., Rákóczi út 54.

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215—96162 1900 Budapest V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

Peranto al eksterlando: KULTURA, H—1389 Budapest P.O.B. 149
Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,— Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto

76-3566 Somogy m. Ny. 3000
Responda gvidanto:
Béla Farkas direktoro
Indexszám: 25 377

LEHEL

LIZENZ BOSCH HAUSGERÄTE

La Fridujfabriko plilongigis la serion de mastrumaj fridujoj.
Jen la du unuaj tipoj de la nova produktaj-familio:

1. 160-litra, dustela-, kun 18 litra ultrafrigidejo ĝis —12 °C; produktita surbaze de BOSCH—licenco; prezo: 5170,— Ft.
2. 200-litra, dustela, kompresora fridujo-, kun 18 litra ultrafrigidejo ĝis —12 °C; prezo: 5640,— Ft.

Gyártja: Hűtőgépgyár

Konsumturist



Valoraj artobjektoj
porcelano de bona marko
stilmebloj

Varojn aĉetitajn
en subaj vendejoj oni povas
sendogane elporti el la lando

Vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto
internacie ŝangebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27., kaj 43.
Hotel Gellért